HUNGARA VIVO

6
1977
8 Ft

KOMENCU ĈE SKÁLA!

SKÁLA

VARSKALO

NI ATENDAS VIN

de la 7-a horo
ĝis la 20-a horo

en nia nutraĵ-sekcio

de la 8-a horo
ĝis la 19-a horo

en nia sekcio
de multspecaj
industri-varoj

Kliento-servo: 850-850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1981 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XVII. jaro 1977. 6-a numero

ENHAVO

László I.: Karnavalaj popolkultimoj en Hungario 1
Amadou-Mahtar M'Bow: UNESKO por la rajto je komunikado 4
Szenes I.: Problemo, kiu koncernas ĉiun popolon Intervjuo kun d-ro József Biró 5
EMBA: Poemoj 9
Lázár E.: La bruo (M. Fejes) 10
W. Blake: La tigro (W. Auld) 10
H. Visnapuu: Orflava kanto (H. Dresen) 10
Király I.: Esperanto estas mia propra lingvo Intervjuo kun William Auld 10
Bálint Sz.: Panoramo 16
Illés B.: Samsono kaj Delila (D-ro Nagy I.) 18
Tóth E.: Viktoro Delmar 19
Fenyvesi E.: Literatura metiejo 20
Gál L.: Poemoj (B. Miličević) 21
D-ro László F.: La utiligo de Danubo 24
Benczik V.: Recenzoj 28
Lesznai L.: Pri la komenco de la okcidenta muzikkulturo 30
Enigmoj 31
Fenyvesi E.: Kiel prononci hungarajn nomojn? 32
Haszpra O.: Fotado de la Suno 32
Leterkesto 32

Sur la titolpaĝo: Karnavalo en Mohács — „buŝooj"

Oni forbruligas pajlo-pupon ekster la vilaĝo por forpeli per tio la malsanojn — en la norda departemento Nógrád

Karnavalaj popolkutimoj en Hungario

La popolkutimoj, kiuj trapenetras — kaj certagrade reguligas — la tutan vivon de iu popolo, tre multmaniere kaj elokvente esprimas la sentimentojn, pensaron kaj moron de tiu popolo. Tiuj kutimoj plimulte ligiĝas al diversaj ceremonioj de la jaraj festoj, tamen ili troveblas ankaŭ ĉe certaj solenaj okazaĵoj, kiel ekzemple bapto, geedziĝa festo aŭ enterigo.

Pri la karnavalaj festoj postrestis sufiĉe multaj historiaj indikoj. Estas verŝajne, ke la hungara karnavala festado strikte ligiĝas al la malnovaj Eŭropaj tradicioj: al la Italaj karnavaloj kaj al tiuj de la najbaraj popoloj. Ĝiaj elementoj integriĝis inter la kutimojn de nia popolo jam post la patrujokupo (896 p. K.). La karnavala sezono ĉiam estis tempo de longa serio de gajaj festadoj, popoludoj en Hungario. Kvankam la karnavala festado en nia toj ĉiam malkonsilis, eĉ malpermesis la bruan kantadon kaj ekstravagancaĵojn, tamen tiuj karnavalaj festoj restis vivaj ĝis la nunaj tempoj.

La plej karakteriza formo de la karnavala festado en nia lando estas, same, kiel ĉe aliaj Eŭropaj popoloj, la apero de diversaj maskitaj figuroj. La unuaj indikoj pri tiu maskerado devenas el la 15-a jarcento. La kutimo de maskeradoj same vivis en la reĝa kortego, kiel ankaŭ en la plej etaj vilaĝoj. Dum la tempo de reĝo Matiaso (15-a jarcento) italaj parencoj de lia edzino sendis donace artajn maskojn al la hungara parencaro. Dum la jarcentoj 15—17, la loĝantoj de vilaĝoj, urboj kaj la korteganoj egale festis kaj amuziĝis maskitaj dum la karnavala sezono.

Masko-provado antaŭ la karnavala balo

La serio de la maskeradoj komenciĝis la 6-an de Januaro, t. e. je Epifanio. En tiu tago oni anonckriis la komencon de la karnavalo. Fraŭloj 16—20 jaraj kun tintiloj kaj vipoj trairis laŭlonge la vilaĝon kaj anoncis, farante grandan bruon: „Alvenis la karnavalo, jam ĉi tie estas la karnavalo!"

Dum ĉe kelkaj Eŭropaj popoloj la karnevale maskitaj homoj defilis en granda amaso, en Hungario oni preferis la ludon de etaj grupoj. La grupoj dum la marŝado eniris kelkajn domojn kaj tie improvizis distrajn aŭ timigajn scenojn.

La plej malnovaj kaj popularaj karnavalaj figuroj estis tiuj kun bestomaskoj. La karnavalantoj surprenis maskon de urso, kapro, ĉevalo, cikonio ktp. La rolantoj de tiu maskerado prezentis ĝenerale etajn dialogajn scenojn, ekzemple kiam mastro kondukas sian ĉevalon al la foiro, por vendi ĝin. Dum la marĉandado la besto svenante falas teren, sternigas morta, kaj poste je muziksono ĝi revivigas denove.

Okazis, ke la karnavalantoj maskis sin metiistoj (ŝuisto, forĝisto ktp.) uzante simplajn materialojn, troveblajn ĉirkaŭ la domo. Iuj maskis sin ankaŭ almozulo, cigano, bandito, Morto, sorĉistino. Ĉiuj maskuloj prezentis ian ludon, konforme al la aperigita figuro. Iliaj ludoj estis ofte regulaj popolaj teatraĵoj, en dialoga formo, kun versaj aldonaĵoj.

Propre, la karnavalo estas enterigo de la vintro kaj samtempe festo de la printemp-alveno. Ni konas multajn variantojn koncerne ĝian festadon, sed la diversaj vintro-enterigaj kutimoj havas ankaŭ komunan trajton; ekzemple, oni konkretigis la vintron en formo de marioneto kaj simbole elpelis ĝin el la vilaĝo.

Kelkaj hungaraj vilaĝoj konservis la kutimon de karnavala amuziĝo kun maskoj ĝis la nunaj tempoj. La plej interesa karnavala maskerado de la aktuala epoko en Hungario estas la grupa „buŝoo-irado" de la sudslava loĝantaro en la urbo Mohács (en la suda parto de la lando). La rolantoj de tiu maskerado aperas en maskoj skulptitaj el ligno. Iliaj movoj kaj konduto estas rite preskribitaj. En la malnovaj tempoj rajtis surpreni buŝoomaskon nur plenkreskuloj, respektive edziĝintaj viroj: fraŭloj portis alian maskon. La t. n. „buŝoo-irado" ĝis nun konservas multajn malnovajn elementojn. En la lastaj jaroj la urba magistrato mem organizas la "buŝooiradon" en Mohács, kaj la loka esperantista grupo regule okazigas renkontiĝon je tiu tempo, ofte kun partopreno de eksterlandanoj.

Krom la besto-maskoj aperas en la vilaĝaj karnavaloj ankaŭ aliaj figuroj. Sed iliaj maskoj, diference de la lignaj buŝoo-maskoj, estas faritaj ĉefe el ĉifonoj, papero. Inter la tradiciaj figuroj ni trovas banditon, ciganinon, gefiančan paron, aŭ paron de maljunulo kaj maljunulino kun sučinfano. Oni kutimas prezenti ankaŭ ŝercan mortoludon aŭ geedziĝan festenon.

Inter la geedziĝ-festenaj ludoj la plej spektakla estas la t. n. „ŝtipeg-treno", akompanata de ŝerca geedziĝa ceremonio, farata en la okcidenta parto de Transdanubio. Tiu maskerado apartenas al la t. n. „fekundec-magiaj" moroj. Dum la karnavalo de 1968 en la vilaĝo Rábatótfalu mi mem ĉeestis tian „ŝtipeg-trenon". Viroj forhakis arbon 31 metrojn altan, ĝian trunkon oni metis sur specialan ĉaron, poste gefraŭloj trenis ĝin de Rábatótfalu ĝis Szentgotthárd (ĉ. 5 km.). Survoje la maskitaj fraŭloj kriis tra la fenestroj de domoj kun fraŭlino: „Jen la ŝtipego, trenu ĝin!" Tiun maskeradon partoprenis 168 maskitaj figuroj; krom la pseŭdo-fianĉinoj kaj fianĉoj kaj la nupta festantaro ankaŭ diabloj, ciganoj, arlekenoj, metiistoj. Dumvoje la marŝado haltis dufoje kaj oni prezentis ŝercan geedziĝan ceremonion.

La „ŝtipego-trenon" oni aranĝis nur tiam, se dum la jaro ne okazis geedziĝa festeno en la vilaĝo. Iam estis kutimo en pluraj regionoj de la lando dum karnavala mardo igi needziĝintajn knabinojn treni ŝtipegon.

En aliaj regionoj de la lando la „ŝtipeg-treno" estis rita varianto de plugado: oni aranĝis ĝin fine de vintro kun la celo alvenigi fekundecon por la tero. En kelkaj lokoj virinoj trenadis plugilon dum la vintrofino laŭlonge tra la vilaĝo.

Kutimo estis dum karnavalo ankaŭ aparta maskerado por fraŭlinoj kaj edzinoj. Unu semajnon antaŭ la karnaval-dimanĉo la „palocoj" (gento vivanta en la norda parto de Hungario, kiu havas dialekton kaj kutimojn forte diferencan de tiuj de aliaj hungaraj regionoj) ĉirkaŭ la monteto Karancs okazigis „dimanĉon de fraŭlinoj". Post tagmanĝo ili iris salutadi, portante rostostangon en la manoj. Iliaj kantoj konsistis el religiaj kaj almozpetaj partoj. La salutadon sekvis vespere dancamuziĝo.

Pri la aparta karnavalado de edzinoj postlasis indikojn Pelbárt *Temesvári*, pastro-verkisto el la 15-a jarcento. En prediko li

priskribis, ke edzinoj en vilaĝo apud la rivereto Kapos (suda parto de Transdanubio) surprenis viran vestaĵon aŭ alie maskis sin kaj longe dancis kaj amuziĝis, ĝis la diablo aperis inter ili, kaptis virinon kaj ĵetis ŝin en la marĉon de Kapos.

Tiajn apartajn virinkarnavalojn ni trovas kelkloke ankaŭ en la nuna tempo. En la vilaĝo Mátraalmás (nord-orienta parto de Hungario), ankoraŭ dum la jaro 1968 maskitaj virinoj trairis la vilaĝon kaj „razis" la virojn per glacipendaĵoj. Vespere estis aranĝita „kat-balo", kiun viroj ne rajtis viziti.

La karnavalo finiĝis je karnaval-mardo kaj cindromerkredo. Dum tiuj du tagoj ĉie en la lando oni prezentis la „enterigon de la karnavalo" en formo de teatraĵo. Kelkloke oni faris ĉerkon el du trogoj, kovrante unu per la alia, trenadis ĝin laŭlonge tra la vilaĝo, poste kun ironia ceremonio oni enterigis ĝin ekster la vilaĝo. Aliloke oni faris pajlo-marioneton, luktis kun ĝi kaj fine detruis ĝin. Ĉiun karnaval-enterigon sekvis dancamuziĝo.

Antaŭ nelonge ankoraŭ estis kutimo dum karnaval-mardo, ke fraŭloj kaj fraŭlinoj surprenis diversajn kostumojn kaj maskojn, aliaj pelton de azeno, kapro aŭ urso; foje fraŭloj virinan vestaĵon kaj fraŭlinoj viran kostumon. Kunportante korbojn, dancante kaj timigante infanojn, ili tramarŝis la vilaĝon, almozpetante kolbason, lardon, ovojn ktp. Infanoj ĝuis la ŝercan marŝadon kaj provis diveni, kiu kaŝas sin sub la maskoj.

Povas lanĉiĝi la demando, kio estis la senco de ĉi tiu longdaŭra ludserio? Ni trovas la respondon en la malnovaj popolkredoj. En la elformiĝo de la karnavalaj kutimoj kaj de ilia funkcio havas decidan rolon la ritoj, ligitaj al la printempa tagnokta egaleco. Ĝis la 20-a jarcento en tuta Eŭropa persistis la kredo, ke la alvenon de la printempo oni devas helpi per diversaj manovroj. La prezento de la batalo inter vintro kaj printempo servis ĉi tiun celon: en ĝi la vintron simbolis figuro, kovrita per pajlo, kaj la printempon homo, ornamita per eterne verda foliaro. En la duelo ĉiam venkis la simbolo de la printempo.

La enterigo de la pajlo-marioneto, poste la karnaval-enterigo en la hungaraj karnavalaj kutimoj ĉiam signifis la adiaŭon al la vintro. La urĝado de la printempo ĉiam estis grava, por certigi la jaran produktopovon de la kampoj. La ĉefa celo de la karnavalaj ludoj, kutimoj, ĉiam estis certigo de la produktopovo — negrave ĉu por homoj, bestoj aŭ por la tero. Ĉi tion pruvas la ofta apero de la figuro de virbovo, cikonio, kapro: en la Eŭropa kaj hungara popolkredo ĉiu el tiuj bestoj estis simbolo de la produktopovo.

La supre skizita bildo prezentas la popolkarnavaladon en

Fraŭloj kolektadas en la vilaĝo dumtage diversajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn per kiuj ili regalas sin mem vespere en gaja societo

Hungario ĝis la unua mondmilito. Tiu festado en la tridekaj jaroj iomete komencis velki. En la kvindekaj jaroj — escepte kelkajn regionojn — ĝi vivis nur en la memoro de la vilaĝanoj. En la nuna tempo la karnavala festado fluas same en urboj kaj vilaĝoj: oni dancas kaj amuziĝas en baloj. Tamen, ekzistas ankaŭ forta intenco de pluraj lokaj magistratoj revivigi la plej originalajn formojn de la karnavalado, kaj tio povas naski belajn rezultojn, kiel okazis en Mohács.

István *László*

En la maskarada marŝado estas trenataj „Hansi kaj Krédli" en la vilaĝo Elek (departemento Békés)

S-ro Amadou-Mahtar M' Bow, ĝenerala direktoro de Unesko

UNESKO
por la rajto je komunikado

Universala Esperanto-Asocio havas konsultajn rilatojn kun UNESKO jam de 1954, sed la 62-a Universala Kongreso estis la unua aranĝaĵo de la Movado, en kiu persone aperis la plej alta reprezentanto de tiu prestiĝa organizaĵo. Ĉi-sube ni publikigas fragmentojn el la parolado de s-ro *Amadou-Mahtar M'Bow*, prononcita en la Solena Inaŭguro.

Sinjoro Prezidanto,

Ĝekongresanoj,

Gesinjoroj!

Estas agrable kapti la okazon de mia oficiala vizito al Islando por alparoli vin ĉe la Inaŭguro de la 62-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. Mi volus sincere danki al la Prezidanto de la Asocio, s-ro Tonkin, pro lia afabra invito.

Vi elektis, gesinjoroj kongresanoj, okazigi vian kongreson pri la temo „Rajto je komunikado". Tio estas temo, kiu interesas UNESKOn pro pli ol unu kialo, ĉar komuniki ja estas interkompreniĝi.

Unu el la plej esencaj taskoj de UNESKO, laŭ ĝia statuto, estas la plifortikigo de la mondpaco, la komprenemo inter la popoloj kaj la kunlaboro inter la nacioj. Esperanto historie fontas el la sama principo. D-ro Zamenhof, entuziasma inventinto de tiu lingvo, estis profunde ĉagrenita dum sia junaĝo pro la apartiĝoj, kiujn la diverslingveco povis kaŭzi en la sino de komunumo. Li konvinkiĝis, ke nur la ebleco de senpera komunikado povus revenigi la pacon inter la homoj, kaj ke estas necese krei universalan lingvon sufiĉe kompletan, neŭtralan kaj alireblan por ĉiu homo. Esperanto, li diris, ne konas nacion malfortan aŭ fortan, privilegiitan aŭ malsuperan.

La revo pri universala lingvo aperas do kiel esprimo de idealo vidi, dank' al la uzo de komuna lingvo, forigon de ĉiuj malakordoj inter la homoj ...

... Tamen, la tiel grava lingva problemo estas nur unu el la aspektoj de la komunikado.

Pro tio, UNESKO okupas sin en longdaŭra agado, kiu, trapasante la klarigon pri la koncepto de la komunikado, celas transformi la praktikon por fakte ebligi al ĉiuj la rajton je komunikado.

Dum sia dek-oka kunsido, en 1974, la Ĝenerala Konferenco de UNESKO ŝarĝis min studi, en konsulto kun la ŝtatoj-membroj kaj la profesiaj organizaĵoj, la koncepton de la rajto je komunikado.

En la momento, kiam oni pli kaj pli konstatas la fundamentan gravecon de komunikado en demokratia socio, kaj kiam la grandskalaj progresoj de la scienco kaj tekniko malfermas gigantajn eblojn al la homoj, la strebo al nova ordo en la mondo koncernas samgrade la komunikadon kiel ekonomiajn, sociajn, kulturajn aferojn. Hodiaŭ oni komencas rekoni la valoron de kultura pluralismo kaj la gravecon por la monda kolektivo konservi la kulturan integrecon de ĉiu popolo. La emfazo pri kultura identeco, bazita sur la rekono de la specifeco kaj egaleco en digno de ĉiuj kulturoj, ne malpermesas fruktodonajn rilatojn. Estas, male, per kontaktoj kaj interŝanĝoj, ke la diversaj kulturoj riĉigas unu la alian. Do, kiel atingi tion, dum la ebleco komuniki ne estas je dispono de ĉiuj, individue kaj nacie? Jen la graveco de plena realigo de la rajto je informado, proklamita en la artikolo 19 de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

Ĉar ne temas nur pri garantio al la popoloj de ebleco aliri kaj utiligi la komunikrimedojn: temas ankaŭ pri certigo de plena reciprokeco de la informfluoj interne de la sama nacio aŭ sama komunumo, kaj ankaŭ inter ĉiuj regionoj de la mondo. Komunikado estas dudirekta procedo, kiu implicas la eblecon informi kaj informiĝi.

Por garantii kaj la liberecon, kaj la ekvilibron de la cirkulado estas esence, ke la diversaj partneroj, sinsekve elsendantoj kaj ricevantoj, disponu pri rimedoj, kiuj ebligas veran dialogon.

La unua malegaleco en la posedo kaj uzado de la informaj rimedoj konsistigas do defion tutmondan, kiu ne povas lasi UNESKOn indiferenta. Efektive, ĝia statuto devigas favorigi la konatiĝon kaj la reciprokan komprenemon inter la nacioj, donante sian helpon al la amasaj informiloj kaj tiucele rekomendante tiujn internaciajn kontraktojn, kiujn ĝi juĝas utilaj por faciligi la liberan cirkuladon de ideoj per vortoj kaj bildoj ..

... UNESKO estas devigita, pro la komuna volo de siaj ŝtatoj-membroj, okupiĝi pri konsideroj, kiuj tuŝas la radikon de unu el la grandaj problemoj de la nuna mondo: krom tiu de informado, estas la problemo ebligi al la homoj *komuniki*. Ĉar oni povas esti „informita" kaj tamen ne „komuniki", kaj kelkaj esploristoj eĉ subtenas la tezon, ke en la kazo de la industriaj landoj ĝenerale ju pli oni „konsumas" informojn, des malpli oni vere komunikas, kaj des pli oni bezonas komuniki.

Post la entreprenita esploro pri la

tuto de la problemoj pri la komunikodo en la moderna mondo, UNESKO esperas vidi la realigon de interkonsento pri tio, kio devas esti la celo kaj la kialo de la komunikado en la mondo, kaj pri la rimedoj, per kiuj la internacia komunumo povus kreskigi sian agadon por fari el la komunikado rimedon unuarangan por progresigo de la popoloj kaj kompreno inter la nacioj.

Gekongresanoj! La celo, kiun via kongreso alprenas, diskutante pri la rajto je komunikado, pri la obstakloj al la apliko de tiu rajto, precipe la lingvaj baroj, estas do en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo.

Ĉar dum la obstakloj al la universala cirkulado de la penso kaj de la ideoj ĉiam ekzistis, la komunikado inter la popoloj kun diversaj lingvoj kaj kulturoj ĉiam ŝajnis esti idealo eminente dezirinda kaj atinginda. Hodiaŭ ĝi montriĝas kiel necesa en mondo, kie senĉese emfaziĝas la interdependo de ĉiuj homoj. La emfazo pri liberaj pensado kaj esprimo estas nepre fundamenta, sed ni devas ankaŭ krei sen ia diskriminacio la kondiĉojn, kiuj ebligas tion...

...En 1974 studo de UNESCO montris la ekstreman malabundon de esploroj pri la transkultura komunikado kaj la obstakloj, kiuj kontraŭas la evoluigon de tiu komunikado: kulturaj diferencoj, psikologiaj baroj malebligantaj la komprenon, manko de komuna lingvo, ktp. Dum la pasintaj jaroj, la debato pri komunikado transkultura tiom pliintensiĝis, kiom kreskis la ebleco de rekta dissendo trans la landlimoj. En la kerno de la debato troviĝas la konsciiĝo pri la fakto, ke komunikado estas potenco. Kelkaj eĉ asertas, ke ĝi estas „*la* potenco". Regi nacian sistemon de informado povas ebligi al certaj interesoj influi la procedon de decidpreno en la socio, eĉ influi la kulturajn kaj politikajn valorojn, kiuj firmigas ĝian unuecon. Tio substrekas ankoraŭfoje la gravecon de la temo, kiun vi debatos...

Sinjoro Prezidanto,

Gekongresanoj!

Mi certas, ke estas samtempe tiu respekto al la kulturaj diversecoj kaj tiu deziro je internacia alproksimiĝo, kiuj vin motivas. Estas pro tio, ke mi deziras tre sincere ke la laboroj de via kongreso estu kaj fruktodonaj kaj pozitivaj.

Imre Szenes

Problemo, kiu koncernas ĉiun popolon de la mondo

Intervjuo kun d-ro József Bíró, ministro pri ekstera komerco

La ĉi-suba intervjuo aperis en la n-ro 1977/5 de la hungarlingva revuo de HEA: „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo). Ĝin anticipis en la sama revuo ampleksa artikolo el la plumo de la intervjuinto pri aplikado de Esperanto sur la kampo de komerco kaj ekonomio.

Kamarado ministro, kiel vi opinias pri la lingvaj problemoj de la monda komerco? Pli precize, pri tiuj lingvaj malfacilaĵoj en la ekstera komerco de la grava plimulto de la landoj — inter ili de Hungario —, kiuj rezultas el tio, ke ili estas devigitaj realigi sian eksportadon kaj importadon pere de kelkaj privilegiitaj t. n. mondlingvoj?

La lingvaj faktoroj de la monda komerco *tuŝas tre multajn landojn* — komencis sian respondon d-ro Bíró. — La situacion pligravigas la fakto, ke en multaj ŝtatoj funkcias pluraj naciaj lingvoj. Kaj eĉ la naciaj lingvoj de la grandaj landoj estas parolataj en diversaj dialektoj. Oni ne uzas saman anglan lingvon en Usono, Kanado kaj Aŭstralio. La intelektaj kontaktoj eĉ inter popoloj kun parencaj naciaj lingvoj ne tiel facile fluas, kiel multaj supozas tion.

Estas do nature, ke en la ekstera komerco de Hungario, kies lingvo praktike malhavas parencojn, *la lingvaj malfacilaĵoj sentiĝas pli forte.* Kvankam tiuj malfacilaĵoj esence samas kun tiuj de ĉiuj aliaj ŝtatoj, kies civitanoj povas plenumi siajn oficialajn internaciajn taskojn nur en la plej disvastiĝintaj fremdaj lingvoj.

Ni havas situacion pli malavantaĝan eble sole pro tio, ĉar post la liberiĝo ni komencis instrui fremdajn lingvojn vere intense en la lernejoj kaj en kursoj nur en la dua duono de la kvindekaj jaroj. La nombro de la sciendaj lingvoj preskaŭ egalas kun la nombro de la landoj, kun kiuj ni komercas, sed por tio ne sufiĉas niaj fortoj. En niaj kontaktoj ni uzas do ĉefe la rusan, anglan kaj germanan, *kvankam eĉ bonaj parolantoj de tiuj lingvoj foje-foje renkontas embarasajn situaciojn dum konversacioj kaj intertraktoj.* Ni bezonus multe pli da fakuloj kun scio de la franca, hispana kaj itala. Landoj, havantaj gvidan rolon en la monda ekonomio, ankaŭ *en tiu ĉi rilato troviĝas en situacio pli facila,* ja ilia nacia lingvo ĝenerale ludas rolon de peranta lingvo en la monda komerco.

Faktoro, influanta la konfidon

Estas konate, ke en la plimulto de la internaciaj traktadoj kunlaboras ankaŭ interpretistoj. Sed ĉu pere de ili, ĉu sen ili, certe ankaŭ vi mem povis ofte senti la lingvajn barojn en la kreo de pli senpera homa kontakto kun la partneroj. Ĉu tiuj spertoj jam igis vin pensi pri tio, ke estus bone, se la popoloj krom sia nacia lingvo havus ankaŭ internaĉian lingvon, kiu ne estus posedaĵo de unu popolo, sed havaĵo de la tuta homaro; lingvon por ĉiuj facile lernebla kaj bone utiligeblan en ĉiuj formoj de la internaciaj kontaktoj?

Mi sentas la lingvan problemon, kiel ĉiu, kiu laboras sur internacia kampo. Tiom pli, ĉar *la agado en la ekstera komerco estas ankaŭ afero de konfido.* En la monda merkato

D-ro József Bíró, ministro pri ekstera komerco reprezentas Hungarion en internacia konferenco

jam delonge estas konkurado, tiel same dum konjunktura periodo, kiel ankaŭ en malkonjunkturo. Tiun konkuradon pliintensigas la teknikaj kaj ekonomiaj progresoj de nia epoko, kaj ankaŭ la komplikeco de la interrilatoj. Tial la personaj kontaktoj estas tre necesaj en ĉiuj branĉoj de la ekstera komerco. Se ekzistas multaj liverantoj de samtipaj varoj, aŭ pluraj faras ofertojn pri varoj de la sama teknika nivelo, la intertraktojn grave influas ankaŭ la fakto, ĉu la ofertanto povas veki simpation ĉe la partnero pere de ties gepatra lingvo aŭ per alia, interkonsente uzata interlingvo; ĉu li kapablas influi la partneron ankaŭ emocie, kaj priparoli kun li ĉion necesan por atingi sian celon, adaptiĝinte al la kulturo kaj pensmaniero de la partnero. *La nivelo de la lingva interkompreniĝo do estas faktoro, influanta la nivelon de la reciproka konfido; ĝi estas grava rimedo de la proksimiĝo inter la homoj.* Kaj ĉio ĉi grave influas ankaŭ la plenumon de la reciproke surprenitaj sindevigoj.

Kompreneble, estus tre bonvena internacia lingvo, kiu — kompare al la nunaj cirkonstancoj — *pluroble plifaciligus la senperajn homajn kontaktojn kaj la interkompreniĝon.* Sed, por atingi tiun ĉi elstare signifan celon, necesos ankoraŭ multege da fortostreĉoj en la tuta mondo. Ĉar eĉ se Esperanto jam estus lingvo akceptita per tutmonda interkonsento, oni ankoraŭ havus antaŭ si la taskon organizi ĝian instruadon en ĉiuj lernejoj de la mondo.

Alportus neviditan raciigon

Estas tiel, sed surbaze de internacia interkonsento la organizo de la instruado jam estus tasko signife pli simpla. La instruantoj de la nun preferataj fremdaj lingvoj en ĉiu lando povus alproprigi tiun ĉi lingvon multe pli facilan ol la naciaj lingvoj kaj dum la sekva lernojaro ili jam povus instrui ĝin en la lernejoj. Kompreneble, dume ili daŭre vizitus perfektigajn kursojn.

Certe estus tiel. Ĝuste pro tio internacia lingvo *donus aparte grandan avantaĝon* por homoj, laborantaj en internaciaj kampoj. Ja ankaŭ la ekstera komerco realiĝas ne sole per simplaj komercaj konversacioj. La fakuloj intertraktas pri multaj temoj, ofte pri komplikaj teknikaj, ekonomiaj kaj aliaj specialaj problemoj. Kaj estas konate, ke *ĉiu fako inkluzive la politikon kaj la kulturan vivon, havas pli-malpli multajn specialajn terminojn kaj propran konceptaron.* Eĉ se mi scias la anglan aŭ alian lingvon, ne estas certe, ke mi bone konas la anglajn aŭ alilingvajn terminojn, tuŝatajn dum la intertraktoj. Eĉ senkonsidere al tio, ke en la angla kaj en aliaj disvastiĝintaj lingvoj multaj vortoj havas plurajn signifojn. *Kun tiu ĉi situacio luktas ĉiuj fakuloj en la mondo, kiuj estos devigitaj intertrakti, diskuti, atingi interkonsentojn pere de fremdaj lingvoj. La lingvaj problemoj sekve do havas plurajn ekonomiajn, fakajn, politikajn, kulturajn kaj psikologiajn aspektojn.*

Antaŭ mi do staras tute klare la tezo, ke, pariĝinte kun la progreso kaj reciprokaj influoj de la naciaj lingvoj kaj kulturoj la enkonduko de internacia lingvo alportus neviditan raciigon sur ĉiuj kampoj de la vivo. Ĉar, laŭ mia scio, en Esperanto preskaŭ ĉiu vorto havas nur unusolan signifon, kaj tiu signifo por ĉiuj personoj — senkonsidere al ties nacia lingvo estas la sama. Tiamaniere estus sufiĉe koni la specialajn esprimojn de ĉiuj fakoj nur en tiu ĉi lingvo kies uzado certigus egalajn lingvajn kondiĉojn por ĉiuj. Ĉar la monda komerco estas konstanta kaj la plej intensa kampo de la internaciaj rilatoj, ĉi tie Esperanto plifaciligus ankaŭ laborojn, kiel ekzemple la vastega korespondado, teletajpado, fakturadoj, skribaj interkonsentoj, preparado de protokoloj ktp.

En nivelo de parlamentoj kaj registaroj

Mi ĝojas, ke kamarado Biró taksas tiel pozitive la signifon de la Internacia Lingvo. Lanĉiĝas do la demando: ĉu ne estus eble kaj utile, ke Hungario apogu kaj akcelu internaciajn iniciatojn, faritajn en tiu senco? Ĉu ni povus antaŭenpuŝi la kiel eble plej baldaŭan oficialan rekonon de la vivanta internacia lingvo inter la socialismaj landoj, inter niaj aliaj partneroj de ekstera komerco, kaj ankaŭ en la internaciaj forumoj?

Tio estus nepre utila, ĉar tiel plivastiĝus la agado kaj efikeco de la tutmonda Esperanto-movado. Sed oni devas ellabori unue oficialan principan starpunkton pri tiu ĉi temo, kaj en tiu starpunkto klare difini la celon kaj la sinsekvon de la eblaj paŝoj, kaj poste krei ankaŭ la jurajn formulojn, necesajn por ili. Ja nenie oni povus simple nur lanĉi proponon, ke oni enkonduku Esperanton sur la kampo de la ekstera komerco aŭ sur aliaj kampoj. *Tiun ĉi aferon oni devas akceptigi unue sur la nivelo de la leĝdonantoj t. e. sur la nivelo de parlamentoj kaj registaroj,* ĉefe en landoj kun gvida rolo en la internacia vivo.

Ankaŭ tiuj landoj devas scii kaj senti: la t. n. mondlingvoj, kiel ekzemple la angla kaj la franca, eĉ por ili ne plu taŭgas kiel internaciaj komunikiloj. Ja ankaŭ *por ili ne estas indiferente, ke nur tre malvastaj tavoloj de aliaj popoloj konas ilian lingvon;* eĉ tiuj nur havas ĝeneralajn lingvajn konojn, aŭ parolas tiun aŭ alian gvidan fremdan lingvon sur turisma nivelo. Sed en nia epoko estus necesa pli efika interŝanĝo de fakaj, teknikaj kaj aliaj konoj. Kaj kun partopreno de la vastaj popolamasoj. Tio ĉi eblas nur pere de internacia lingvo, facile ellernebla por ĉiuj landoj de la mondo. *Pli profunda amikeco inter la popoloj, ekonomiaj kontaktoj pli vastaj ol la nunaj, kaj la avantaĝoj de la multaspekta paca kunlaborado povus vere disvolviĝi nur tiamaniere. Sed por tio unue oni devus gajni la ŝtatajn forumojn de diversaj landoj,* kaj ne nur tiujn de malgrandaj landoj, sed ankaŭ la forumojn de ŝtatoj kun gvida rolo, havantaj signifan influon.

La ŝlosila demando

En ĉiuj evoluintaj landoj, grandaj kaj malgrandaj, funkcias Esperanto-movado, havanta kreskantan fortòn; tiuj landaj movadoj klopodas atentigi sian registaron pri tiu ĉi internacia problemo per diversaj kampanjoj ...

Sed tiuj kampanjoj ne sufiĉas, ĉar ili foje progresas, foje ne progresas — konstatis la ministro. — La demando konsistas en tio, kiel estas eble aranĝi, ke kompetentaj naciaj kaj internaciaj forumoj metu en tagordon la problemon de internacia lingvo.

Vi tuŝas la ŝlosilan demandon de la afero, kamarado Biró. Pro tio mi menciu kelkajn paŝojn, faritajn en tiu direkto, kiel ekzemple la agadon de poresperanta grupo de 55 deputitoj en la brita parlamento; studojn de sovetaj esperantistaj lingvistoj, kiuj liveras science bazitajn informojn pri la ebla solvo de la internacia lingva problemo ankaŭ al la gvidantaro de la soveta partio kaj al la registaro; signifajn grupojn de deputitoj en la sveda, itala, franca, japana kaj aliaj parlamentoj, kiuj grupoj jam manifestis sian simpation al tiu ĉi afero ankaŭ per konkretaj proponoj; tiel agis ankaŭ kelkaj sindikataj centroj; Universala Esperanto-Asocio antaŭ kelka tempo turnis sin kun memorando al la registaroj de ĉiuj landoj, subskribintaj la Kontrakton de Helsinki, do, ankaŭ al la hungara registaro. Sed la registaroj, la kompetentaj ministerioj ĝis nun ne deziris aŭ ne havis tempon okupi sin pri tiu ĉi tre grava problemo, ĉar ili disponas ĉiam pri sufiĉa nombro da interpretistoj dum la interŝtataj internaciaj traktadoj.

En ĉio ĉi kaŝas sin multa vero, ĉar mi povas diri ankaŭ pri nia registaro, ke *ni devas zorgi pri tiel multaj problemoj en la ĉiutaga, kureganta vivo,* ke mi sentas, kune kun miaj kolegoj ministroj, malsufiĉaj eĉ la 24 horojn de la tago kompare al niaj multiĝantaj kaj akumuliĝantaj taskoj. Sed mi devas diri, ke nia registaro ĝis nun ricevis neniun seriozan proponon pri ĉi tiu problemo. Cetere, ne signifus multe, se nur unu lando ekagus por tiu ĉi afero. *En tiu ĉi temo estas necesa komuna ekago de kelkaj ŝtatoj.* Tio estus la komenco, sed necesas ankoraŭ persista klopodado por atingi tion.

Nur povas esti reala tasko *nur la konstanta antaŭpreparado kaj akcelado de la oficiala rekono de la internacia lingvo ĉe konvenaj forumoj de diversaj landoj.* Nur poste la demando povus esti prezentita al la kompetentaj internaciaj forumoj. Estus naiveco kredi, ke tio estas celo rapide atingebla, sed ankaŭ *estus krimo diri, ke tiu afero ne progresos, ni ne okupiĝu pri ĝi. Tiu ĉi* granda internaciisma, humanisma afero bezonas ankoraŭ persistan, obstinan luktadon.

Kondiĉo de interŝtataj paŝoj

Vere. Kiel vi opinias do, kamarado ministro, pri la propono, subskribita de 140 parlamentaj deputitoj, kiu estis transdonita al la prezidanto de la kultura komisiono de nia parlamento? Ĉu vi subtenas la celon de tiu ĉi propono, nome tion, ke en la kadro de la kultura komisiono oni kreu provizoran subkomisionon, kun partopreno de parlamentanoj kaj lingvistoj, cele de tio, ke tiu ĉi subkomisiono preparu science bazitan raporton por la registaro, respektive por la parlamento, pri la lingvaj problemoj de la internaciaj rilatoj kaj ties solvo per Esperanto?

Jes, mi konsentas pri la starigo de tia provizora subkomisiono. Kaj mi subtenas, ke ĝia raporto estu prezentita al la registaro. Kompreneble, la registaro decidas kolektive, sed mi estas konvinkita — kondiĉe, se la parlamenta subkomisiono proponos al la registaro realajn iniciatojn, por kiuj eblus gajni almenaŭ kelkajn aliajn landojn — ke nenio malhelpus, ke ni faru certajn paŝojn ankaŭ en internacia kampo.

Mia lasta demando ligiĝas al tiu ĉi temo. Kiel vi opinias, kamarado Biró, pri la starpunkto de prestiĝaj eksterlandaj kaj hungaraj lingvistoj kaj aliaj sciencistoj, laŭ kiu en tiu ĉi afero devus fari la unuajn komunajn paŝojn registaroj de landoj, kies lingva situacio estas simila al tiu de Hungario, nome, kies lingvo ne estas unu el la t. n. mondlingvoj? Laŭ tiuj scienculoj, la esenco de la paŝoj devus esti tio, ke la menciitaj registaroj prezentu la konatajn lingvajn problemojn al la plej alta monda forumo, kaj persiste agadu por la akcepto de la Internacia Lingvo pere de interkonsento en UN.

Tio estas logika starpunkto. *En la internacia politiko ni devas atingi solvon de la lingvaj problemoj, koncernantaj ĉiujn popolojn de la mondo,* per interkonsenta akcepto de la ekzistanta internacia lingvo kaj per ĝia institucia, deviga lerneja instruado. Sed la vojo, kondukanta al tiu celo, povas esti nur tio, ke *la pleje interesitaj ŝtatoj ekzamenu tiun ĉi demandon unue en sia kompetenteco. Ankaŭ el tiu ĉi vidpunkto estas apoginde, ke la kultura komisiono de nia parlamento komisiu al la proponita subkomisiono prepari raporton pri la afero de internacia lingvo. Poste, surbaze de tiu propono, ankaŭ nia registaro povus ekzameni la eblon de pluaj paŝoj.*

Kamarado ministro, dankon pro la intervjuo.

CENTRUM

DIVATCSARNOK: SORTIMENTO, BELGUSTO

VI. NÉPKÖZTÁRSASÁG ÚT 39

Poemoj de EMBA

Emeriko Baranyai — plumnome *EMBA* — naskiĝis en la jaro 1902, kaj la morto forprenis lin kiam li ankoraŭ ne plenumis sian 60-an jaron, fine de 1961. Li havis vivon malfacilan, kaj ne estas hazardo, ke ĝuste li fariĝis la unua *vera* laborista poeto de la esperanta literaturo. *Vera* eĉ duoble: la unua li dediĉis sin prikanti la zorgojn kaj dolorojn de la laboristaro kaj ĉiuj subremitoj, kaj *vera* en tiu senco, ke liaj poemoj, verkitaj pri tiu temo, rezistas la tempopason. Hungara Esperanto-Asocio omaĝis al lia memoro per inaŭguro de memortabulo sur la muro de la naskiĝdomo en la vilaĝo *Alap*. Kolekto de liaj poemoj aperis ĉe la eldonejo *Stafeto* sub la titolo *Ekzilo kaj azilo* en la jaro 1962.

Demokratio vivu!

Jen, kamparanoj ĉifonvestaj
solene staras sub la arda sun'.
Sur sulkaj vangoj ĝojoj festaj
pro l'granda horo alveninta nun.
Al ili zumas, jen, la muziksonoj
kaj ne al princoj, grafoj kaj
baronoj.

Ĝis nun baronoj, grafoj, princoj
uzurpe regis sur ĉi larĝa kamp'.
Kampuloj penis kun dentgrincoj
en ŝvit', malsato kaj humila
ramp'!
Jarmilon ili ĝemis en ĉifonoj,
dum pompis princoj, grafoj kaj
baronoj.

Nun jen la kampo, dividite!
Finiĝis la miljara termalsat'.
Kiuj ĝin knedis ĝis nun ŝvite,
ricevas ĝin de l' laborula ŝtat'
Por ili kreskas naturdonoj,
kaj ne por princoj, grafoj kaj
baronoj.

Ho brila hor' de tempoj novaj!
En alta bluo kantas alaŭd'.
Sub ĉiellumoj dancomovaj
tra gajaj kapoj ŝvebas vivolaŭd'.
Demokratio vivu! La blazonoj
rompiĝis, princoj, grafoj kaj
baronoj!

Popol' ni estas...

Popol' ni estas, ne movado nura,
kaj nia land' la tuta ter'.
Standardo nia, de sangverŝoj pura,
portas koloron verdan de l' esper'.

Kaj havas ni heroojn, eĉ martirojn
luktintajn kun malico kaj malkler'.
Poetoj propraj sonorigas lirojn
pri amo, paco, justo kaj liber'.

Car kreis nin laŭ sia psika bildo
l'unua homarano, Zamenhof,
ni luktas plu kun senmakula ŝildo
por nova mondo kaj por bona nov'.

Popol' ni estas, ne movado nura.
La religio al ni la kompren'!
La lingvo kara, viva kaj matura
por ĉiuj sin proponas kiel ben'.

Popol' ni estas ĉie en popoloj,
kulturon propran portas per
torĉflam'.
Kojniĝis ni en ĉiuj homtavoloj.
Aŭ — tiel estu, se ne estas jam!

Lampoj kaj steloj

Post estingiĝ' de l' lampobruloj
la tempo pasis jarpostjare,
ĝis, blindiĝinte, la okuloj
komencis ree vidi klare.

Post estingiĝ' de l' lampobruloj
l' okuloj ree **vidis klare,**
foriĝis la incensnebuloj,
la ruĝa stelo brilas kare.

La ruĝa stelo brilas kare,
kaj ni esperas, ke en helo
esperradia kun ĝi para
rebrilos nia verda stelo.

Mi

Denaske iĝis mi hungaro
(pri vol' neniu min demandis).
Oni min lulis sur kamparo
(la av' ĝin nudpiede plandis).

Sub oraj spikoj de tritiko
min nutris sole pano seka,
al sonĝoj estis la liriko
la trista voĉ' de blovo bleka.

Mi de fremdnoma grafo lernis
la patriaman vortojonglon.
(Parenc' de tiu graf' ekstermis
el patriamo mian onklon).

Preĝeje la predik-fabelo
vanecon de la riĉ' instruis,
sed firme pompis la kastelo
kaj la instruon belan truis.

Denaske iĝis mi hungaro,
sed same povus esti polo.
La tutamonda proletaro —
jen mia lando, mia skolo!

Mi volas esti homo nura,
libera de la rudimentoj,
en kiu brulas flame pura
fratamo al la homaj gentoj.

La neakireblajo

Mi plugis virgan grundon ĉe vilaĝo
kaj semis grenajn grajnojn dum
junaĝo,
sur fremda kampo kurbajn garbojn
ligis,
de fru' ĝis nokto min labor' ŝvitigis,
nokte forpelis mi la sonĝfeinon
kaj tamen ne akiris skribmaŝinon.

Mi lernis skribi, libroteni false,
laŭ la ordon' de l'ĉefo danci valse,
honeste trompi kiel komercisto,
vendadi kiĉajn bildojn de la Kristo
kaj miksi akvon en la bonan vinon,
sed tamen ne akiris skribmaŝinon.

Mi flegis florojn en fremdula korto,
ne timis de surdorsa sterkoporto,
mi estis vice laboristo taga,
komizo, oficisto, landovaga
agent' uzanta la persvad-rutinon,
sed tamen ne akiris skribmaŝinon.

Salajris mi en multaj laborformoj,
libere, fikse kaj sub prem' de normoj,
mi servis kapitalon, komunumon,
sed, sopirante la sufiĉan sumon,
mi trafis ĉiam nur ĉi frostan finon:
mi tamen ne akiris skribmaŝinon.

Mi verkis versojn, gazetartikolojn,
mi lernis dogmojn kaj aniĝis skolojn,
mi legis prozon mute, versojn kante,
movadis, esperantis esperante,
pro la movad' eĉ perdis amatinon,
kaj tamen ne akiris skribmaŝinon.

Ervin Lázár:

La bruo

sonludeto

INĜENIERO
MINISTRO
SEKRETARIINO

(Ni aŭdas susurajn sonojn de fabriko. La bruoj tre gravas en la ludo, kvazaŭ akorda muziko ili akompanas la eventojn, por de tempo al tempo fariĝi ĉefrolantoj.)

INĜENIERO: Diablo prenu... tiu ĉi stranga bruo ... Jam ekde tagoj... *(Li aŭskultas la monotonan bruon.)* Denove... sencese... *(Kun abrupta decido)* Mi vokos lin... Mi telefonos al li.

(Knareto de telefona ciferdisko.)

SEKRETARRINO: *(en sanĝinĝinta)* Alo!

INĜENIERO: Donu la ministron!

SEKRETARIINO: *(en oficiala tono)* La sinjoro ministro *(ŝi emfazas la vorton sinjoro)* ĉi-momente...

INĜENIERO: *(interrompante ŝin)* Mi parolas el la fabriko.

SEKRETERIINO: *(en ŝanĝiĝinta respektplena tono)* Ĉu la sinjoro inĝeniero?

INĜENIERO: Kiu alia do mi estus? *(pluraj intermitaj sinsekvaj bruetoj, poste voĉo de la ministro)*

MINISTRO: Bonvolu. Mi esperas, ke nenio malbona.

INGENIERO: *(hezitante)* Ĝuste pri tio... *(li eksilentas)* Tamen io malbona.

MINISTRO: Parolu, pro Dio! Ĉu la fabriko?

INĜENIERO: Jes.

MINISTRO: *(timiĝante)* Pri iu ajn financo ni zorgos. Dum la plej mallonga tempo. Nur diru, kion vi bezonas. Kiom da tempo estas necesa por fari la riparojn?

INĜENIERO: Ĝuste tio...

MINISTRO: Kio?

INĜENIERO: Iu bruo... ia disonanca, misa sono...

MINISTRO: Ĉu vi jam konstatis...

INĜENIERO: Tiuokaze mi vin ne ĝenus... la malbono kuŝas en tio, ke mi ne sukcesas konstati... Nur miaj oreloj, kiel rafinita mezurinstrumento. Por mi tiu ĉi fabriko muzikas... la plej bela muziko ĉimonde... Kaj nun tiu bruo...

MINISTRO: Sed homo, se la fabriko haltas, por ni finiĝis ĉio. Espereble tion vi scias.

INĜENIERO: Ĝuste mi ne scius! Tiu fabriko ja estas mia verko. Mi konas en ĝi ĉiun najlon, ĉiun ŝraŭbon.

MINISTRO: *(ordone)* Sola vi povos ripari ĝin, neniu alia!

INĜENIERO: Jes, ja, kompreneble mi... Nur se mi scius, pro kio estas tiu ĉi bruo...

MINISTRO: Ĉu la komputilo?

INGENIERO: Ĝi donas konvenan respondon al ĉiu demando. Ŝarĝo estas en ordo, energio-provizo optimala, transmisioj regulaj.

MINISTRO: Ĉu la produktado?

INĜENIERO: Kontinua. En la direkto-ĉambro ĉiu montrilo estas en sia loko, la instrumentoj ne montras ion nenormalan.

MINISTRO: Kaj tiam?

INĜENIERO: Ĉu do vi ne komprenas? Iu disonanca bruo, ia eta, nekutima missono. Ne pensu, ke mi idiotiĝis. Mi estas sana, kiel ĉiu aliulo. Sed miajn orelojn neeble trompi. Dekdu jarojn mi estas ĉi tie. Mi aŭdas ĉion. Se ŝtopiĝas fajna klapo... se skarabo falas en tubojn... se triviĝas pivoto... ĉion. Kaj nun tiu ĉi bruo. Eble la montriloj ankoraŭ signas nenion, la produktado daŭras laŭregule... sed poste... iu eksplodo... komprenu... eksplodo kaj finite... la fabriko, la urbo, la lando...

MINISTRO: Vizitu laŭvice la ĉambregojn!

INĜENIERO: Ja mil fojojn mi jam rondiris. Nenion mi faras krom tio, ĈIe mi aŭdas.

MINISTRO: Laŭiru ankoraŭfoje. Poste tuj mi petas raporton. Mi tenas la kontakton.

INĜENIERO: Bone.

(Frapsonas la telefonaŭdilo metita surtablen, ni aŭdas eĥon de paŝoj el koridoro.

INĜENIERO: La pumpilejo... eble tamen la pumpilejo.

(Li haltas. Aŭtomata pordo malfermiĝas, li enpaŝas. Ĉirkaŭfluas lin karakterizaj lirlaj, susuraj, siblaj sonoj de pumpilejo.)

INĜENIERO: Mi aŭdas... aŭdas... aŭdas... Sed same mi aŭdas ankaŭ en la turbinejo. Samtiel. Samforte.

(Denove sono de aŭtomata pordo, ni estas inter turbinoj. La spektanto kompreneble ne aŭdas ion nenormalan. Kutima bruado de turbinoj.)

INGENIERO: Ankaŭ ĉi tie... Frenezige... eĉ, ĉi tie.

(Rapide li iras en alian ĉambregon, pordo malfermiĝas kaj fermiĝas sono de turbinoj restas ekstere, aŭdeblas klakanta, bruanta, krakanta sono de komputilo.)

INĜENIERO: La komputilo. Kiom multe mi laboris por ĝi! Kaj perturbo ĉi tie! En ĝi! *Li aŭskultas, la komputilo regule funkcias.)* Mi aŭdas. Eĉ nun mi aŭdas.., Kaj, se eble en la maŝinejo..., eble en la maŝinejo...

(Pordo. Ni estas en maŝinejo. Bruo de maŝinoj.)

INGENIERO: Jen! Ankaŭ ĉi tie. Kaj la reaktoro...

(Pordo. Sonojn de la reaktoro mi imagas esti sinistra »muziko de sferoj«.)

INĜENIERO: Ankaŭ ĉi tie... Ĉiun elementon mi mem esploris ...

la akcelilon... la elektronpafilegon... mi aŭdas... aŭdas... aŭdas la bruon.
(La pordo fermiĝas malantaŭ li, denove ni aŭdas komunan sonon de la tuta fabriko. Frapsonas paŝoj de la inĝeniero. Li prenas la telefonaŭdilon.)

INĜENIERO: Alo!

MINISTRO: Ĉu trovite?

INĜENIERO: *(pesimisme) Nenio nova...* La sama, kiel ĝis nun... Ĉie. Tiu malbenita bruo...

MINISTRO: *(strečite)* Ĉu vi aŭskultas min?

INĜENIERO: Jes.

MINISTRO: Ĉu vi ne pensis eventuale pri... *(li eksilentas signifoplene)*

INĜENIERO: Pri kio?

MINISTRO: Pri sabotaĵo!

INĜENIERO: Ĉi tie? Kiu do sabotus?

MINISTRO: *(Incitite)* Nu, iu laboristo. Aŭ teknikisto.

INĜENIERO: *(mokeme)* Ĉu laboristo? Kiaspeca laboristo? Antaŭ du jaroj ankoraŭ ekzistis laboristoj. Sed se vi ne scius pri tio: ni aŭtomatiĝis. Nur precizaj, akurataj maŝinoj. Nur ĵli estas perfektaj. Ne okazas malfruiĝo, mismovo, »mi forgesis«, »morgaŭ mi faros«...

MINISTRO: Kaj ĉu la kvin teknikistoj? Pasintjare ankoraŭ kvin teknikistoj laboris ĉe vi.

INĜENIERO: Ili ne necesas. Ĉiu homa ekmovo — estas eblo por erari, kaj — ja vi scias — ĉi tie ne licas erari. Nur eta pormomenta penspaŭzo, eta deflankiĝo de disciplino kaj ni flugos sen flugiloj.

MINISTRO: Sed sen kunlaborantoj...

INĜENIERO: *(interrompas lin)* Kiu laboris en la pumpilejo, tiu ĉiam kantis.

MINISTRO: Kaj kio malbona? Li havis bonan humoran.

INĜENIERO: La fabriko ne estas operejo. Miaflanke li povas eĉ jubilkanti — sed ne ĉi tie. Ĉi tio estas fabriko. Respondeco.

MINISTRO: Ĉu vi lin maldungis?

INĜENIERO: De la kantado nur unu paŝo estas ĝis vino kaj brando. Foje li venus ebria, hazarde li movus neĝustan konektilon kaj finite... Homo povas erari. Eĉ, sobra homo.

MINISTRO: Ĉu vi aŭtomatigis la pumpilejon?

INĜENIERO: Jes. Aŭtomatiko de duobla direktado, kun multobla sekurigo. Eblo de eraro forigita, sen risko... unu post la alia mi maldungis ĉiun: antaŭ du semajnoj foriris la lasta.

MINISTRO: Ĉu vi laboras nun tute sola?

INĜENIERO: Kun miaj maŝinoj, la plej bona societo. Okazas nenia kantaĉado, okulumado, pug-lulado.

MINISTRO: Kiam foriris la lasta?

INĜENIERO: Jam dirite, antaŭ du semajnoj.

MINISTRO: Ĉu neeble, ke li...

INĜENIERO: Ke ŝi estus farinta ion?

MINISTRO: Propre.

INĜENIERO: Maleble. Ŝi laboris ĉe la reaktoro. Ŝi povis tuŝi nur unusolan mezurilon. Se tamen al io ajn cetera ŝi tuŝiĝus, tuj eksonus la alarmsignaloj... Ne, maleble... Ĝuste ŝi... la puglulanta malgravulino...

MINISTRO: Alo. Mi ne komprenas klare.

INĜENIERO: Negrave. Ia ulino estis tiu teknikisto. Ŝi briligis al mi la okulojn... Ridetis... por montri sian sanan dentaron... Ĝuste por tio mi havas tempon... Kaj ŝia luliĝanta pugo... Kostis du tutajn monatojn. Du tutajn monatojn...

MINISTRO: Kio?

INĜENIERO: Aŭtomatiko en la reaktoron. Homo jam superfluas. Kaj ŝi povis foriri kun siaj brilantaj dentoj kaj luliĝanta pugo.

MINISTRO: Ĉu ŝi estis nefidinda?

INĜENIERO: La maŝino estas pli fidinda. Kaj ĝi ne volas paroladi kun mi, ne volas rakonti al mi siajn stultajn sonĝojn, la maŝino ne parolas sed plenumas sian laboron.

MINISTRO: Kaj se tamen, se tiu ulino... Por venĝi... kaŝis aŭ misinstalis ion...

INĜENIERO: Mi povas rigardi. *(frapsonas la aŭdilo, paŝoj.)* Kion ŝi ja farintus. Ĝuste ŝi... *(pordo malfermiĝas kaj fermiĝas, la konataj bruoj el la reaktoro.)* Jen, ŝia parfumo... *(Li ensnufas aeron)* Jen, emanis ŝia parfumo *(profunde li snufas)* Eĉ, post du semajnoj... Kion ŝi povintus fari?... La favorata koloro... En ruĝa overalo ŝi briligis sin ĉi tie al mi... Ne en blua, ne en blanka — en ruĝa overalo!... La ruĝa iel emfazis siajn koneksaĵojn... Kiun koloron mi favoras? Ĉu mi jam tagmanĝis?... Ŝiaj stultaj demandoj... Kaj ŝi estus ion farinta... Se nur pecon da metalo ŝi estus enportinta, tuj eksonus ok sirenoj kaj du alarmsonorigiloj... Kion scias pri tio tiuj...? Ministro... Bruto... Sed tiu ĉi bruo.. Kio ĝi povas esti? *(Li orelumas)* Fantastike...
(Frapsonas la paŝoj, pordo, ŝanĝiĝo de bruoj, li reiras al la telefono.)

INĜENIERO: Alo! Nenia malnormalaĵo... tiaspeca... Nur la bruo.

MINISTRO: Tamen, tiun virinon ni vokos al aŭdienco. Diru ŝian nomon.

INĜENIERO:: Mi ne memoras.

MINISTRO: Pensu!

INĜENIERO: Vane mi pensadas... *(paŭzo)* Ia Anna... aŭ Annamaria

MINISTRO: Negrave. Ni trovas ŝin. Eĉ kudrilon ni trovas en pajlostako, se temas pri la fabriko. Kaj ĝis tiam... kion vi proponas? Kion vi petas? Parolu.

INĜENIERO: Eble... tio povas esti ankaŭ... *(li ekkrias)* Ke ĝis nun ne venis tio al mi en la kapon!

MINISTRO: Kio?

INĜENIERO: Ke la bruo... ke tiu bruo devenas ne de la fabriko, sed ekstere. La supersonaj livermaŝinoj... Jen! La flugmaŝinoj! Proksime situas la aerodromo. La flugmaŝinoj! *(Če tiu ĉi sceno la bru-efikon oni devus plenumi tiamaniere, ka la jam pli frue nerimarkeble enportita bruo de flugmaŝinoj plifortikiĝu, plilaŭtiĝu.)*

MINISTRO: Ĉu eble?

INĜENIERO: Tre verŝajne. Tuj haltigu la trafikon de flugmaŝinoj.

MINISTRO: Via deziro estas absurdaĵo. Jus ni ja komencis...

INĜENIERO: *(interrompas lin) Temas pri la fabriko!* Haltigu la aertrafikon! Nur por kvin minutoj.

MINISTRO: Mi transŝovas la respondecon al vi.

INĜENIERO: Mi akceptas. Donu ordonon por la aerodromo! *(El la te-*

La bruo

lefonaŭdilo klakantaj voĉeroj filtriĝas, poste voĉo de la ministro.)

MINISTRO: Atentu! Tuj ili haltos. *(Pli mallaŭtiĝas kaj formortas sono de la flugmaŝinoj, ni aŭdas sole bruon de la fabriko.)*

MINISTRO: Ĉu tio estis? Alo!

INĜENIERO: Ŝajnos al mi, ke ne. La bruo eĉ nun klare aŭdiĝas. Tute klare kaj pure. Kvazaŭ estus ia perturbo antaŭ eksplodo, serio de rompoj, tuboj disfendiĝintaj... Haltigu ankaŭ la fervojon, la vagonarojn... ĉi tie ili preterruliĝas antaŭ la fenestro... Eble la vagonaroj...

MINISTRO: Sed ja...

INĜENIERO: Haltigu! Ankaŭ la surstratan trafikon. La tramojn, aŭtoĉarojn! La urbo eĉ ne ĉitumu! *(Ordone)* Ĉu komprenite?

MINISTRO: Jes.

(La bruo de vagonaroj kaj de la strato envenas sammaniere, kiel pli frue tiu de flugmaŝinoj. El la telefono denove voĉeroj, la ministro donas la ordonojn. Vagonaro bremsas. Haltas. Tramoj ankaŭ, grincas bremsoj de autoĉaroj. Ĉesas la eksteraj bruoj, ni aŭdas nur tiun de la fabriko.)

MINISTRO: Haltas la trajnoj, la ĉaroj, la tramoj. Mutas la urbo. Rapidu!

INĜENIERO: Ekstere... Ekstere nenio.

MINISTRO: Ĉi tie ekstere regas silento. Bruas sole la fabriko. Ĉu vi aŭdas ankoraŭ... aŭdas ankoraŭ la bruon?

INĜENIERO: *(mallaŭte)* Nun jam ĝi tondradas... Multoble pli forte... Ni devas jam nin prepari por la plej malbona evento.

MINISTRO: Faru do ion, pro Dio!

INĜENIERO: Mi devas haltigi... Unu laborejon post la alia.

MINISTRO: La fabrikon! Kion vi pensas?

INĜENIERO: Nenion krom tio mi povas fari. Ne timu. Entute nur por unu minuto. Mi devas rekoni, la bruon.

MINISTRO: Do tiam ne malfruiĝu! Kion vi atendas?

INĜENIERO: Por unu minuto ĉiu rigidiĝas. Ne timu.

MINISTRO: Nur faru jam!

INĜENIERO: Por la unua la pumpilejon. Nur unu premo al butono. *(El inter la bruo de la fabriko fornaĝas ŝriko de la pumpilejo.)*

MINISTRO: Ĉu tio estis?

INĜENIERO: Ne. Ankaŭ nun mi aŭdas la bruon. Eble la turbinoj. *(Mutiĝas ankaŭ la turbinoj)*

INĜENIERO: Ankaŭ nun. Ne ĉesas... eĉ, plifortiĝas.

MINISTRO: Malŝaltu ankaŭ la maŝinejon. *(Haltas la maŝinoj)*

INĜENIERO: Jam haltas.

MINISTRO: Kaj la bruo?

INĜENIERO: Senĉese... mi aŭdas.

MINISTRO: Malŝaltu ankaŭ la komputilon.

INĜENIERO: *(en ekstazo)* Nur unu butono, unusola butono... *(Formortas bruo de komputilo.)*

MINISTRO: Alo! Alo!

INĜENIERO: Jam funkcias sole la reaktoro.

MINISTRO: Kaj la bruo?

INĜENIERO: Mi aŭdas ĝin. *(Aŭdiĝas sono de la reaktoro kaj ia tre fora, laŭritma batado.)*

MINISTRO: Tiuokaze ĝi povas esti nur en la reaktoro. En nenio alia. Haltas ĉio. La urbo, kvazaŭ tombejo. Mi diris jam, ke tiu virino..

INĜENIERO: Mi haltigas, Silenton! *(La ministro eksilentas, plimalfortiĝas sonoj de la reaktoro, kaj poste en la plena silento ekklakadas plifortiĝas batado de koro.)*

INĜENIERO: Dio mia! Mia koro...

MINISTRO: Alo! Kion vi diras!

INĜENIERO: *(rapide timeme)* Mi funkciigas la fabrikon.

(Unu post la alia ekbruas la ĉambregoj) Startu do la flugmaŝinoj, la trajnoj, ordonu rapide...

MINISTRO: Alo, kio okazis?

INĜENIERO: Nenio, ĉio estas en ordo.

(Parolfragmentoj el la telefono, la bruon de la maŝinoj superas batado de koro.)

INĜENIERO: Ekirigu jam do! Kriegu ĉio!

(Ekmugas la flugmaŝinoj, la trajnoj, la tramoj, sed la korobato ŝvebas super ĉiuj.

INĜENIERO: Pli laŭte! Pli laŭte!

MINISTRO: Kia perturbo estis?

INĜENIERO: Nenia. Absolute nenia... Pli da flugmaŝinoj! Pli da vagonaroj! *(Al si mem)* Tiu mia stulta koro... tiu!

MINISTRO: Tiun virinon ni pridemandis.

INĜENIERO: *(post longa paŭzo)* Ĉu ŝin oni trovis?

MINISTRO: Jes. Sed ŝi scias pri nenio.

INĜENIERO: Kaj ŝia nomo? Kiel ŝi nomiĝas?

MINISTRO: Vi bone memoris: Anna.

INĜENIERO: Anna... *(Per mildiĝinta voĉo)* Anna! Jes, ja. *(Li krias)* Diru al ŝi, ke mi preferas la ruĝan koloron!

MINISTRO: Kion mi diru al ŝi?

INĜENIERO: Ke ŝi venu ĉi tien... mi volas kun ŝi paroli... rapidu! *(La bruo transformiĝas muziko, kaj en tiu muziko kiel timpanono batadas la koro de la viro.)*

Tr. M. Fejes

Poeziaj programoj en Esperanto

En novembro kaj decembro okazis esperantlingvaj Ady-vesperoj en tri polaj urboj — Varsovio, Gdansk kaj Koszalin — ,kaj ankaŭ en la Germana Demokratia Respubliko, Berlino, rezulte de la kunlaboro de la Hungara Instituto pri Kulturaj Interrilatoj, Hungara Esperanto-Asocio kaj la respektivaj landaj asocioj.

Enkadre de la programo konigis la vivon kaj poezion de la granda hungara poeto *V. Benczik*, ĉefredaktoro de Hungara Vivo. György *Somhegyi*, aktoro de la Budapeŝta Teatro Radnóti, deklamis la plej konindajn poemojn de Ady, kantistino Éva *Für*, kun la pianakompano de Judit *Lak*, prezentis hungarajn popolkantojn kaj kelkajn el muzikigitaj poemoj de Ady.

En Berlino okazis ankaŭ aparta programo, en kiu estis prezentita la ĵus reaperinta fama originala poemaro *Kvaropo.*

William *Blake:*

LA TIGRO

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
Ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno
Por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsis batoj koraj,
Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis
Kaj sur la ĉielon larmis,
Ĉu la verko al li karis?
Ĉu vin ŝafid-farinto faris?

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

El la angla: William *Auld*

Henrik *Visnapuu:*

ORFLAVA KANTO

Orflava estas park', orflava estas koro.
Du paŝoj en pereo ora.
Orflava estas voj', orflava estas koro,
Jen paro en pereo ora.

Jen paro en parolo ora,
La koro estas flava, oraŭtuna.
Du paŝoj dum parolo ora,
Du koroj en parolo oraŭtuna.

Parolas koroj du en ora sonĝo,
Diverse ambaŭ tiuj koroj flavas.
Jen mia kor' en sia ora sonĝo.
La via, jen alikolore flavas.

Orflava estas park', faladas orfolioj,
Orpapilioj glitas teren.
Orflava estas voj', faladas orfolioj
Sur vojon. Ĉu maldekstren nun aŭ dekstren?

El la estona: Hilda *Dresen*

William Auld

„Esperanto estas mia propra lingvo…"

Intervjuo kun William Auld

Kial vi verkas esperantlingve?

Vi volas diri, kial mi skribas esperantlingve, anstataŭ anglalingve? Mi skribas esperantlingve, ĉar ĝi estas kiel ĉefa lingvo en mia vivo. Mi estas dulingvulo, kaj la esperanta lingvo estas tre interesa, sed krom tio, la angla lingvo havas sufiĉe multajn talentojn, kiuj prilaboras ĝin, dum Esperanto havas malpli da talentoj. Kaj se mi eventuale havus iom da talento, pli volonte mi dediĉas tion al Esperanto, kiu ĝin bezonas.

Ĉu vi sentas, ke vi povas verki esperantlingve pli facile? Ĉu vi povas esprimi vin pli facile?

Same facile en ambaŭ lingvoj mi povas esprimi min, sed volonte mi esprimas min literature en Esperanto. Kaj mi povas diri al vi, ke okazis tre stranga afero. Mia esperanta lingvaĵo influis mian uzadon de la angla lingvo pli, ol okazis inverse. Mi havis okazon konstati lastatempe tion. Tio estas fakto, ĉar mi diskutis tion kun amiko, kiu atentigis min pri tio.

Ĉu vi ne sentas, ke vi povas malkaŝi vin en fremda lingvo eble pli facile, ol en via gepatra lingvo?

Sed vi devas memori, ke por mi Esperanto ne estas fremda lingvo, Esperanto estas mia propra lingvo, ĉar mi elektis ĝin. La anglan mi lernis hazarde, ĉar hazarde miaj gepatroj loĝis en Britujo, kaj estas britoj… Sed mi *elektis* Esperanton. Do, ĝi ne estas fremda lingvo, ĝi estas mia dua, aŭ *alia* lingvo, paralele kun mia nacia lingvo. Mi scias, ke tio estas ne rekonata afero,

sed por mi, persone, tio estas efektiva fakto.

Kion vi opinias pri viaj propraj verkoj?

Kompreneble, ili estas majstroverkoj, ĉu ne? Ne, ne! Verkisto ĉiam interesiĝas pleje pri la venonta verko. Kiam verkisto jam finis sian verkon, en la unuaj kelkaj tagoj li estas tiel kontenta, ke li verkis tiun majstroverkon, sed baldaŭ ĝi fariĝas malnovaĵo, kaj ne plu interesas lin. Do, vere, kiam mi legas kelkajn poemojn en mia junaĝo, mi tre hontas... jes, fakte. Mi verkas, ĉar ĝi estas mia arto, mia maniero min esprimi, kaj... jes!... mi ŝatas legi miajn proprajn verkojn, post kelka tempo tio estas interesa sperto...

Kiu estas via plej ŝatata verko?

Evidente... *La Infana Raso...* Ankaŭ mi legas tion sen tro multe da honto!

Kie vi vidas vian lokon en la esperanta literatura procezo?

Do, mi povas diri al vi tute sincere, ke antaŭ dudek jaroj mi ekhavis ambicion esti la posteulo de Kalocsay. Mi tion diras tute sincere, ĉar li estis tiom pli aĝa, ol mi: pli ol tridek jaron pli aĝa ol mi, evidente... Kaj mi pensis: nu, Kalocsay faris tion kaj tion, kaj mi volas kunhelpi en la konstruado de la esperanta literaturo. Se mi havas reputacion en la esperanta literaturo, tio estas plejparte pro manko de aliaj talentoj, ol pro mia propra kapableco.

Ĉu vi pensas tion sincere?

Ho jes! Efektive ekzistas multaj verkistoj, surprize multaj, en Esperanto. Do... Estas tre malfacila demando, ĉu ne? Mi simple volas verki en Esperanto, kaj mi volas ankaŭ kuraĝigi aliajn verki en Esperanto. Kiel redaktoro, ekzemple, mi ĉiam serĉis novajn talentojn, kaj volas instigi, entuziasmigi tiujn personojn al verkado. Se mi havas rolon, ĝi estas plie rolo de instiganto. Mi esperas, ke venos foje ia nova geniulo; ni havis ĝis nun nur eble du-tri geniulojn en la movado. Do, ke eble venos geniulo, kiu verkos vere klarajn verkojn.

Ĉu vi konsideras iun, kiel vian antaŭulon? Ne en tiu senco, kiel vi parolis pri Kalocsay, sed mi pensas pri aŭtoro (angla, eble), kies arto influis vin.

En Esperanto, verŝajne Eŭgeno *Miĥalski*, rusa, fakte sovetia poeto estis tiu, kiu pleje influis mian esperantan stilon, Krome, evidente Reto *Rossetti*, kiu estis kvazaŭ mia instruisto. La usona poeto Ezra *Pound* ankaŭ multe influis min, kiam mi estis juna, kaj eventuale ankaŭ Alexander *Pope*. Jes, fakte. Mi tre admiris lin, kaj multe studis liajn verkojn, kaj tiuj influis min diversmaniere. Nuntempe la ĉefa influo al mi estas *Byron*, ĉar mi relegis liajn verkojn lastatenpe, kaj trovis multajn interesaĵojn.

Kio estas via opinio pri la esperanta kritiko?

Do, ĝi ekzistas, kompreneble. Ni havas Benczik en Hungario. kiu estas unu el la plej elstaraj kritikistoj... Mi devas diri ankaŭ Haupenthal en GFR.. en Brazilo estas Nogueira... Sed, krom ili, tre malmultaj dediĉas la necesan atenton al tiu fako... Oni multe parolis pri la neceso fari tion, sed oni tre malofte tion faris. La kaŭzo de tio estas manko de publik-ebleco. Jes, en multaj revuoj oni recenzas tute mallonge, eĉ en la revuo *Esperanto* de UEA oni limigas al 250 vortoj... Tio ne estas kritiko, estas nur mencio, ĉu ne?

Ĉu vi pensas, ke la esperanta kritiko estas serioza kritiko, ne nur glorigo?

Sanĝiĝis iomete tiu situacio antaŭ 20—40 jaroj. Fakte *Literaturan Mondon* vi mem konas. Tiu revuo iniciatis la seriozan recenzadon. Oni povas tion diri. Ankaŭ en Britujo estis anglalingva revuo, kiu nomiĝis *International Language*, kaj kiun eldonis la Brita Esperanto-Asocio: en ĝi oni — diablo prenu! — en angla lingvo recenzis esperantajn verkojn sufiĉe seriozete... Sed, *Literatura Mondo* estis tiu influo — ĉefe Tárkony, sed ankaŭ Kalocsay kaj aliaj, eĉ Szilágyi —, sub kiu oni entreprenis seriozan pesadon de la valoro de verko, ne simple, ke dank' al Dio, ke ĝi aperis en Esperanto. Kaj jes... sed ankaŭ hodiaŭ estas relative malfacile kritiki malfavore. Se mi havus tempon, mi povus rakonti al vi anekdotojn pri tio...

Ĉu mi povus demandi vian opinion pri Baghy?

Mi havas grandan admiron al Baghy. Efektive. Sed kiel ĉuj aliaj esperantistoj, mi ankaŭ venis sub la sorĉon de lia personeco, kiun mi trovis tre aminda — kiel ĉiuj aliaj... Kiam mi estis tro juna, mi havis antipation kontraŭ kelkaj el liaj verkoj. Tro da sentimentaleco, kio al mia temperamento ne tre konvenas. Relative mi ne estas emocia... do, mi estas pli seka persono, supraĵe... Sed mi devas diri, ke eĉ sintenon, mi ege admiris ekzemple en tiu periodo, kiam mi havis tiun lian romanon *Sur sanga tero*, mi treege admiris lian poezion: ĝi estas tute alia speco de poezio, ol la mia... kaj ankaŭ ol tiu de Kalocsay. Ankaŭ mi skribis sufiĉe multe pri la stilo de Baghy... Li uzis la lingvon absolute nature Li estis homo, kiu parolis nature la lingvon, kaj tio evidentiĝas el liaj verkoj. Kun la tempopaso, ke mi maljuniĝas, mi trovas ĉiam pli kaj pli gravajn kvalitojn en la verkaro de Baghy. Lia kontribuo al la esperanta literaturo estas netaksebla. Ĉar li estis vere la unua populara verkisto ankaŭ de poemoj, kaj tio mem estas tre grava faktoro... Li popularigis nian literaturon tre multe... Do, entute, mi subtaksis lin antaŭ multaj-multaj jaroj, kaj nun mi lernis aprezi multe pli varme liajn proprajn kvalitojn.

Ĉu vi trovis multe da hungarismoj en la lingvo de Baghy?

Nur unu, kaj li kulpas ĝin, se vi volas. En la fruaj verkoj. Sed poste li konstatis tiun mankon mem, kaj forigis ĝin. Ekzemple: »en mano kun libro«. Tio estas tute allasebla laŭ la reguloj de la esperanta lingvo, sed tamen estas hungarismo. Neniu alia naĉio kulpas ĝuste tiun frazon. Sed ĝi estas la sola hungarismo, kiun mi trovis. Sed ĝenerale mi ne trovis tiajn, ĉar mi ne konas la hungaran lingvon. Iu amiko diris al mi, ne hungaro, ke en la hungara lingvo adverboj ludas iom analogan

rolon, kiel la adverbo en Esperanto. La adverbo en Esperanto estas tre speciala, ni uzas ĝin tute ne laŭ la reguloj kutimaj en la hindo-eŭropa lingvofamilio. Do, mi supozis, ke tiu estas ia indiĝena esperanta afero, sed poste oni starigis al mi la tezon, ke ĝi devenas iomete el la hungara lingvo. Poste mi konstatis, ke estis ĝuste Baghy, kiu plej frue ekuzis la adverbon tiel libere, kiel oni faras nuntempe en Esperanto. Verŝajne ankaŭ tio povas esti hungarismo, sed se jes, ĝi estas grava kontribuo al Esperanto.

Laŭ via opinio, kiaspeca devus esti la esperanta literaturo? Kion signifas internacia literaturo?

Ho! Vi starigas vere komplikajn demandojn! Kaj mi devus respondi per kelkaj vortoj, ĉu ne? En kiu direkto ĝi iru? Do... evidente ĝi estas iom tikla demando... Mi estas homo, kiu kredas, ke oni devas esti pacema, esperantisto devas esti tolerema al la homfratoj... Iel verki el nenacia vidpunkto. Vidu, ĉiu homo, ĉiu esperantisto estas du personoj. Mi estas skoto, ekzemple. Hejme, en Skotlando mi havas kelkajn skotajn opiniojn, skotan politikon ktp. Kaj tio koncernas min en mia lando. Kiel esperantisto, tio kvazaŭ foriĝas el mia menso, kaj mi pensas monde, universale, universalece. Do, la simpla respondo estas, ke laŭ mia opinio la esperanta literaturo ne devas baziĝi nacie, sed universalece. Ĉar ĉiu homo havas kvalitojn nacajn, se vi volas, aŭ limigitajn iamaniere, kaj ankaŭ havas universalajn kvalitojn. Vidu, la plej gravaj emocioj en la mondo estas universalaj. Oni larmas, oni timas, oni ĝojas — tiuj estas universalaj emocioj. Do, mallonge, mi ne opinias, ke la nacieco havas gravan lokon en la esperanta literaturo. Por doni ekzemplon: mi redaktis la *Esperantan Antologion*, kaj tie mi simple metis la aŭtorojn laŭ certa subjektiva ordo. sen indiko pri nacieco kaj oni ne povas konstati la naciecon de la poetoj nur pere de la poemoj. Do, kaj tamen, inter ili estis sufiĉe multaj verkistoj kun sufiĉe forta nacia sento. Ekzemple Schwartz, li estis tre franca, alzaca efektive, tamen... li havis tiun francecon, sed tiu ne tro, ne klare montriĝis en liaj esperantaj verkoj. Esperantisto devas esti du personoj: devas esti naciano unuflanke, kaj universala homo aliflanke. Alie mi apenaŭ vidas sencon en tio, ke li estus esperantisto. Tio estas nek kontraŭ, nek por nacieco, tio estas unu flanko de tiu individua homo. Jen, mia opinio pri tio. Mallonge.

Kion vi opinias pri la nivelo de nia literaturo?

El estetika vidpunkto ni havas poezion tute egalan al la poezioj al mi konataj en la mondo dum la sama periodo. Se oni parolas pri la angla literaturo, oni ĉiam fanfaronas pri Shakespeare aŭ Keats ktp., sed ili ĉiuj verkis antaŭ 1887. Se oni rigardas la anglan poezion ekde 1887, laŭ mia opinio la angla poezio ne estas supera al la esperanta poezio. Efektive mi foje pensas, ke ĝi estas guste malsupera. Jes. Tio estas estetika demando, kiun oni devas multe esplori. Sed mi parolas nur pri sentoj. Dum tiu ĝusta periodo la esperanta literaturo estas almenaŭ tiel same matura. En la poezio. Post la poezio ni apenaŭ havas literaturon. Ni havas nur kelkajn unuopajn verkojn, kiuj valoras, bone... sed ne formas iun korpuson, iun fortan tradicion.

Jes. Kaj la dramo?

Dramo ne ekzistas. Bedaŭrinde. Por ke dramo ekzistu, devas ekzisti teatraj grupoj. Oni ne verkas dramon en vakuo. Oni verkas dramon, por ke aktoroj ĝin prezentu. Kaj tio mankas al ni.

Kiujn vi konsideras la plej elstaraj nuntempaj verkistoj?

Nu... De Kock, Goodheir... Do.

Ĉu? Sufiĉe mallonga vico.

Do, ĉu vi pensas pri Tárkony? Tárkony jam hodiaŭ ne estas avangarda verkisto, kaj nun ni pensas pri homoj, kiuj nuntempe aktive kaj energie verkadas, ĉu ne?

Kio pri Boulton, Ragnarsson?

Jes, kompreneble Boulton estas mia samtempulo, kaj mi estas senlima admiranto de ŝia talento. Sed dum la lastaj kelkaj jaroj pro profesiaj kaŭzoj ŝi ne povis dediĉi sin al la esperanta — cetere nek al la anglalingva — verkado. Ŝi havas studojn, kiujn ŝi devas plenumi. Ŝi skribis al mi lastatempe, ke nun, kiam proksimiĝas la fino de tio, ŝi sopiras reveni al la verkado en ambaŭ lingvoj, speciale en Esperanto. Verŝajne ŝi revenos sur la kampon, kaj se tio okazos, do, evidente ŝi estos unu el la elstaraj talentoj. Ragnarsson estas unu el tiuj homoj, al kiuj persone mi estas surda. Vi scias, ke en ĉiu literaturo oni ne povas ŝati ĉiun: estas simpla surdeco. Ankaŭ en la angla lingvo tio okazas, ekzemple Worldworth nenion diras al mi. Bedaŭrinde. Mi rekonas lian talenton, sed li nenion diras al mi.

Ĉu vi pensas, ke la tradukliteraturo havas tiel gravajn funkciojn, kiel antaŭe?

Jes, evidente, unu el la taskoj de la esperanta literaturo estas peri la verkojn de ĉiuj naĉioj al ĉiuj naĉioj. Do, tio evidente devas daŭri eterne. Ekzemple, mi jam diris al vi en privata konversacio, ke pere de Esperanto mi povas koni la hungaran literaturon pli facile kaj fidinde, ol pere de la angla lingvo. Kaj tio estas grava afero. Ankaŭ la vjetnaman literaturon mi povas ekkoni nur pere de Esperanto, ktp. Oni ofte diras nuntempe, ke mi estas homo, kiu volas havi nur originalajn verkojn. Kaj mi protestis. Ekzemple, oni diris en *Esperanto en Perspektivo*, ke Auld estas homo, kiu nur hazarde tradukas. Kaj mi jam eldonis preskaŭ tricent tradukojn. Mi tradukas ofte, kaj plej volonte. Oni ĉiam volas ĝeneraligi kaj troigi. Jes, mia specialaĵo estas ĝuste la originala esperanta literaturo. Nature. Sed mi ankaŭ tradukas, legas tradukojn, kaj mi interesiĝas pri la literaturoj de la mondo. Estas stulta afero, fakte, ke eĉ venas en ies kapon, ke mi povus esti iel kontraŭ-traduka. Traduko estas unu el la gravaj funkcioj de Esperanto. Mi ne scias, tiuj du brancoj de la literaturo ne povus ekzisti unu apud la alia? Kiel tio okazas en la naciaj lingvoj.

Dankon pro la intervjuo.

Ildikó *Király*

PANORA

Plurcentoj partoprenis el dudek landoj la programojn de 3-a konferenco de la gepatra lingvo. D-ro József Rognár, akademiano, prezidanto de Mondligo de Hungaroj, salutas la partoprenantojn en la malferma solenaĵo

Dum la monato aŭgusto okazis en Budapeŝto la 3-a konferenco de la gepatra lingvo. La celo de tiu aranĝaĵo estas varti la hungaran lingvon kaj kulturon inter tiuj hungaroj, kiuj vivas eksterlande. Ĉiujare 250 infanoj 7-14 jaraj somerumas ĉe la lago Balatono, kie pedagogoj instruas ilin pri la hungara lingvo kaj pri hungaraj poemoj kaj dancoj. Por gejunuloj inter 15 kaj 18 jaraj same okazas ĉiujara lingva seminario en la urbo Sárospatak. Ekzistas helpo ankaŭ por pedagogoj, instruantaj la hungaran lingvon eksterlande: la ĉiujara perfektiga kurso, kiun aranĝas la Mondligo de Hungaroj, en la urbo Debrecen. La programon de la ĉijara konferenco spicis la 4-a festivalo de amatoraj popoldancaj trupoj de hungaroj, vivantaj eksterlande. Partoprenis en ĝi entute 16 trupoj el diversaj okcidentaj landoj.

* * *

La 8-an internacian hidrologian perfektigan kurson, komisie de UNESCO, la hungaraj akvoekonomiaj sciencaj organoj aranĝis en Budapeŝto. La scienca hidrologio okupiĝas pri la kemia kaj fizika kvalito de dolĉakva kvanto en la tuta mondo. La fakuloj observas la ŝanĝojn de akvovantoj kaj la influon de homa interveno por plibonigi la purecon de la akvo. Dum la 6-monata kurso la fakuloj okupis sin pri la plej modernaj esploraj metodoj, informiĝis pri internaciaj rezultoj kaj plivastigis la teoriajn sferojn de konoj. La oficiala lingvo de la kurso estis la angla, la prelegantoj estis universitataj profesoroj kaj sciencaj esploristoj. Ĉirkaŭ 500 teoriaj kaj praktikaj horoj alterniĝis dum la kurso kaj fine ĉiu partopreninto faris sciencan laboraĵon.

* * *

La Eŭropa Fizika Asocio aranĝis kvintagan korpusklofizikan konferencon en Budapeŝto.. La interkonsilado okupiĝis pri la elementa kinematiko de materio. La konferencon malfermis György Marx, hungara akademiano, la ekondukan prelegon faris Samuel C. C. Ting, Nobel premiita Usona profesoro kaj la ferman paroladon diris Bruno Pontecorvo, Lenin-premiita profesoro. La altnivela scienca konferenco okupiĝis pri la „kvarkoj" (elementoj de korpuskloj, kiuj konstruas la atomkernojn.) Temis ankaŭ pri malkovro de nova korpusklo, kiu aperas en la induktita situacio de kvarkoj. Inter la scienculoj el 40 landoj aperis Abdus Salam, direktoro de Internacia Teoria Fizika Centro de UNESKO, Eric Burhop, Lenin-pacpremiita scienculo. Konsiderindajn referaĵojn prezentis la hungaraj scienculoj Gyula Kuti, István Montvay kaj György Pocsik. Dum la konferenco oni varme festis la 75-jaran Nobel-premiitan profesoron P. A. M. Durac, kiu antaŭ 50 jaroj kunigis la kvantumteorion kun la relativismo. Tiu mondfama Durac-ekvacio rezultigis la malkovron de antimaterio.

* * *

Ĉijare la tradician Bartók-seminarion oni aranĝis en la okcidenthungarlanda urbo Szombathely. Partoprenis ĝin 60 muzikistoj kaj muzikpedagogoj el 27 landoj. En la pedagogia altlernejo, en la Bartók-koncerthalo kaj en la Bartók-muziklernejo oni certigis ĉiun kondiĉon por helpi la senĝenan laboron. Krom fortepianistoj kaj violonistoj partoprenis ankaŭ 14 kapelestroj. La ĉijara, 11-a Bartók-seminario denove estis altranga muzika evento por muzikamantoj el diversaj landoj.

Partoprenantoj en la fortepianista-sekc
Pál Kadosa, komponisto, profesoro de

IO = PANORAMO

En la orient-hungarlanda regiono „Hajduság", en urbo Hajdúböszörmény estis aranĝita la 14-a somera internacia artista kolonio. En la malferma ekspozicio oni prezentis la grafikaĵojn de Kálmán Csohány. En la „krea-tendaro" krom la hungaroj partoprenis belartistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, G. D. R., Italio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio. La reciprokan informiĝon helpis la diversaj diskutoj, ekspozicioj kaj prezentadoj. Post la disdono de la premioj, la urbo Hajdúböszörmény aĉetis artaĵojn por sia galerio, kies kolektaĵo tie pretiĝis dum la pasintaj jaroj en la artista kolonio.

* * *

En la vilaĝo Nagycenk, en la iama rezidejo de la familio Széchenyi, estas la Memormuzeo honore al la granda hungara patrioto de la pasinta jarcento, István Széchenyi. En la tuta lando en ĉiu urbo kaj vilaĝo trovigas placo aŭ strato nomita pri li. Valoran kuprogravuraĵ — kolektaĵon ricevis a mŭzeo antaŭnelonge de János Csenár, maljuna pensiulo. La kolektaĵo konsistas el 125 pecoj kaj estis farita en la reformepoko inter la jaroj 1825–1827 en urbo Pozsony (nun Bratislava). La artisto Ferdinand Lütgendorf prezentas en ĝi kun la titolo „Hungara Pantheon" la deputitojn kaj altrangulojn de la iama Hungara Parlamento. Nuntempe estis starigita en la granda halo de la muzeo bronzskulptaĵo de Széchenyi, kreita de Miklós Borsos. La plej nova artaĵo de la muzeo estas 300x400 centimetrojn granda gobleno de artisto Ernő Fóth pri Széchenyi kaj pri liaj ĉefaj faritaĵoj.

* * *

La kulturado de kuracplantoj havas malnovan tradicion en Hungario. La foraĉetadon kaj cirkuligon faras la entrepreno „Herbaria", kiu zorgas ankaŭ pri laboratoria kontrolado. Herbaria posedas modernajn sekigajn kaj prilaborajn maŝinojn por la kuracplantoj. Sepdek procentoj de la tuta kvanto devenas el agrikultura produktado, la aliaj el kolektado de arbaraj kaj kampaj vegetaĵoj. El papavo kaj ergoto estas preparataj vivsavantaj medikamentoj. Aliaj gravaj spicaĵ- kaj kuracplantoj estas: majorano, sinapo, kumino, fenkolo, koriandro. La kvanto kaj kvalito de majorano estas konkurkapabla en la tuta mondo. Mondfama estas ankaŭ la hungara kamomilo, kies elstaran kvaliton certigas la speciala konsisto de humo. Serĉataj eksportvaroj estas la sambukfloro, mento, tiliofloro, juglandfolio, artemizio, ocimo, rozbero ktp. Ne estas nombrebla la tuta sortimento; en la oficiala farmacia kodekso ja pli ol 200 specoj estas troveblaj! En la fakvendejoj la apotekistoj volonte klarigas la uzadon de kuracplantoj.

internacia Bartók-seminario. Meze sidas apeŝta muzikakademio

La sekiga aparato dum mallonga tempo antaŭpreparas la kamomilflorojn por plua prilaborado en la uzino de Herbaria en Békéscsaba

La moderna tekniko en la tuta mondo grandmezure bezonas aluminion. Hungario havas riĉajn trovejojn el baŭksito, ĉefe en la montaro Bakony. En la vilaĝoj Bakonyjákó kaj Iharkut la geologoj trovis plurmilionojn da tunoj el bonkvalita erco tute proksime al la surfaco. La kavaĵoj estas 60—80 metrojn larĝaj kaj 90—100 metrojn profundaj, sekve ne necesas mini sub la tero kaj fari ŝakton. Per terrabotmaŝinoj oni forigas la senfruktan teron kaj subĉiele fosas la ercon. Pro la grandega mineja laboro la vilaĝo Iharkut ne plu estas loĝebla, sed por la loĝantoj aliloke, laŭdezire estas konstruataj novaj domoj.

* * *

La konstantaj arkeologiaj esplorfosadoj denove rezultis apud la vilaĝo Nagyecsed-Sárvár grandvalorajn arkeologiajn trovaĵojn. En la epoko de hungara patrujokupo, ĉirkaŭ la jaro 950, tiu teritorio apartenis al la militestro Tas, poste lia nepo Üllő posedis la regionon. Cent jarojn post tio estis konstruita la trinava baziliko kaj la monaĥejo. Ankaŭ malnova tero-fortikaĵo kaj pli ol 200 tombtrovaĵoj venis al la surfaco. La retrovitaj arttrezoroj estas videblaj en la muzeo Jósa de la urbo Nyíregyháza.

Komp. *Szilárd Bálint*

Béla Illés

Samsono kaj Delila

Béla Illés

Dum kvin tagoj mi militservis en la armeo de la filištoj. Ĉiutage plurfoje ni militiris en sangaj bataloj kontraŭ la judaj taĉmentoj. Inter la bataloj, en la liberaj duonhoroj nia trupeto (kelkaj judoj kaj filištoj) kunvenis ĉe la piedoj de Egipta sfinkso. Ni legis la Estetikon de Hegel.

La soldo de filišta soldato estis trimil aŭstraj kronoj por tago. La saman soldon ricevis ankaŭ la judaj soldatoj. La judaj batalantoj opiniis, ke oni devus pagi pli al ili. Nome, ili portis barbon, kaj kiam ni, filištoj jam atendadis en la tramhaltejo, ili okupiĝis ankoraŭ pri la forlavo de la barbo.

Post kvartaga hezitado la judoj sendis delegacion al la ĉefreĝisoro, postulante kromsalajron pro la barbo. La ĉefreĝisoro pacience aŭskultis ilin.

— Kinostatisto estas kinostatisto — li respondis. Mi ne faras diferencon inter judoj kaj filištoj. Mi estas demokrato.

— La filmentrepreno Saŝa pagas ducent kronojn pli al tiuj vikingoj, kiuj saltas en la maron, ol al tiuj, kiuj nur persekutas ilin kaj ne saltas en la akvon!

— Ĉi tio koncernas Saŝan. Sed, se mia opinio interesas vin, mi estas konvinkita, ke Saŝa faras stultaĵon. La kromsalajro rezultigos, ke pli multaj saltos en la akvon, ol estus nepre necese por sukĉesigi la filmon.

Tiamaniere la aparta agado de la judoj fiaskis. La valoro de la trimil kronoj malpliiĝis de tago al tago, eĉ, de horo al horo. En Aŭstrio furoris la inflacio, kaj unu kilogramo da pano hieraŭ kostis 1800 kronojn, hodiaŭ ĝia prezo estas 2700 kronoj. La prezo de la trambileto altiĝis de 170 kronoj al 480 kronoj.

Tiu filišta kompanio, en kiu mi dežoris, havis la taskon gardi sinjorinon Delila. Ni ne estis tre superšutitaj per laboro. Ni havis do sufiĉe da tempo por prepari salajrobatalon, en kiu judoj kaj filištoj batalos šultro ĉe šultro. Kinostatisto ne tre taŭgas por tia agado. Tiutempe (en la tria jaro post la unua mondmilito) Vieno estis renkontejo de ĉiaspecaj aventuristoj de tuta Eŭropo. La judaj kaj la filištaj batalantoj rekrutiĝis el la plej fia parto de tiuj.

Je mia plej granda surprizo niaj soldatkamaradoj volonte partoprenis en salajrobatalo. Ni diskutis nur pri tio, ĉu en la strikkomitato estu pli da aŭstroj ol hungaroj, kaj pli da italoj ol poloj. Iel ni interkonsentis. La pritraktoj estis mallongaj, ĉar la membroj de la strikkomitato apenaŭ komprenis la lingvon unu de la alia. La interkonsenton ni konfirmis post sanga batalo, malantaŭ la dorso de la jam menciita sfinkso. La gvidanto de la plano estis juda ĉefpastro. Liaj anstataŭantoj: filišta soldato kaj filišta ministro.

Ni havis bonšancon. La sekvontan matenon oni fotografis la t. n. »grandan scenon«. La ĉefreĝisoro postenigis okcent statistojn tiel, ke la kinospektantoj vidu almenaŭ dudek mil. La situacio estis la sekva: Ni, filištoj, malliberigis Samsonon, kies kapo (dank' al Delila) estis tiel kalva, kiel biliardglobo. La judojn, rapidantajn helpi al la malliberigita Samsono, ni dispremis. Samsono staris meze de ili, šnurligite. Ĉirkaŭe kušis plurmil judaj kadavroj. Kaj nun de malantaŭ la sfinkso antaŭenpašas Delila, akompanata de filištaj militistoj. Delila ludas kun pavplumo. Šia vizaĝo brilegas pro la felico kaj fiero.

Ni provis la »grandan scenon« kvin- aŭ sesfoje. Ĉio iris glate, kiel...

— Atentu! Surfilmigo! — kriis la reĝisoro per paroltubo.

— Ek! Ni komencu!

Do, ni atakis kaj kaptis Samsonon. Ni mortigis kelkmil judojn, la kadavroj kušis ĉe niaj piedoj kaj dum la fotografiistoj laboris febre, de malantaŭ la sfinkso antaŭenpašis Delila.

— Pli malrapide! Pli dignoplene — kriis al. Delila la reĝisoro.Kaj Delila ridetis: fiere kaj dignoplene.

En tiu ĉi momento ni (la venkintaj filištoj) levis niajn stanfolie ornamitajn šildojn kaj lancojn kontraŭ la ĉielo, kaj eligis kriegon:

— Ni ne ludos por malpli ol kvinmil sescent kronoj!

Je nia laŭtega krio leviĝis la mortintaj judoj kaj ankaŭ ili komencis kriadi.

— Ni ne ludos por malpli ol kvinmil sescent kronoj!

La reĝisoro terŭre blasfemis. Delila svenis.

La fotografiistoj ĉesigis la laboron kaj šajnis, ke la sceno tre plačas al ili.

— Aĉa kanajlaro! Vi fušis la filmon — plengorĝe kriis la reĝisoro.

— Ni ne ludos por malpli ol kviminil sescent kronoj!

— Via brŭtaleco mortigis Delilan!

— Ni ne ludos por malpli ol kvimil sescent kronoj!

— Kiam la reĝisoro jam raŭkiĝis pro la kriado, komenciĝis la intertraktado. Post duonhoro ni interkonsentis. La reĝisoro plenumis niajn postulojn.

La sekvontan tagon ĉesis la trafiko de tramoj. En la urbo cirkulis famo, ke la laboristaro de Wiener-Neustadt ekstrikis.

Ni, kelkaj filištoj kaj judoj, piediris unu kaj duonan horon por alveni al la loko de la filmado. Dum-

voje ni interparolis pri tio, kiom da kromsalajro peti pro la longa piediro.

Alveninte en la tendaro, ni rapide ŝanĝis la vestojn, surmetis niajn filiŝtajn jupojn kaj belegajn arĝentajn kaskojn. Poste ni kuris en la korton, kie okazis la filmado. La pordego de la korto estis ŝlosita. Sur la pordego estis afiŝo: oni eksigis nin, cirkaŭ tridek personojn, el la laboro.

Ni komencis bategi la pordon per niaj lancoj, kaj la reĝisoro aperis sŭr la muro de la fortikaĵo. En la mano li tenis paroltubon. Per ĝi li adresis la sekvan paroladon al ni, pli precize al tiuj statistoj, kiuj ne estis eksigitaj el la laboro.

— Atentu! — kriis la reĝisoro. — La direktoraro de nia entrepreno sciiĝis kun granda indigno, ke hieraŭ vi detruis, fuŝis la filmon. Je mia peto oni rezignis postuli de vi la prezon de la fuŝitaj filmoj. Sed oni ordonis al mi ne pagi pli ol tri mil kronoj al unu kinostatisto. Kiu emas labori por tiu sumo — mi dungas lin volonte. Kiu estas malkontenta — tiu povas foriri. La provokintojn de la hieraŭa skandalo mi eksigis el la laboro.

Mi jam menciis, el kiaj tavoloj formiĝis tiutempe la aro de la kinostatistoj. Do, ne necesas emfazi, ke la granda plimulto akceptis la kondiĉojn de la reĝisoro. Ni — la eksigitoj — dum iom da tempo bruadis, poste ni volis surmeti niajn ĉiutagajn, civilajn vestojn. Sed baldaŭ ni eksciis, ke la vestgardejo estas ŝlosita kaj la ŝlosilo troviĝas ĉe la vicreĝisoro. La aĉulo ne volis malŝlosi la vestgardejon: ni atendu tiujn, kiuj laboras.

Kion fari? Ni iris al arbareto, situanta je kelkcent paŝoj de la kinurbo. Tie kuŝante ni legadis la Estetikon de Hegel. Ne longtempe.

Ĉe la alia flanko de la arbareto, sur la kampo aperis malgranda grupeto: junuloj, laborista junularo. Kiel ni, ankaŭ ili legis. Evidente ili estis sen laboro, kaj manke de nutraĵo ili sin turnis al la scienco. De tempo al tempo la vento kunportis al ni la nomon de Marx.

Baldaŭ ni enuis observi la laboristajn junulojn, ni eĉ forgesis pri ili, sed kanto denove turnis nian atenton al tiu direkto. Ĉu ni bone aŭdas? Ĉu tion kantas la laboristoj?

Prinz Eugen, der edle Ritter

Wollt den Kaiser wiederkriegen ...

Aperis sur la kampo cirkaŭ okdek studentoj, ĉe siaj butonoj kun elegantaj hokokrucoj. Post kelkaj minutoj la laboristaj junuloj jam forkuris de antaŭ la superforto. La hokokrucanoj kaptis unu laboristan knabon kaj ĝissange bategis lin.

Kiam ni rekonsciiĝis el la surprizo, la tuta kampo estis jam en la manoj la hokokrucanoj.

— Ĉu ni toleru ĉi tion? Ni dispelu ilin!

— Per kio? — demandis la singarda ĉefpastro.

— Per lanco! Per ŝildo!

— Ĉu per paperŝildoj? Ĉu per paperlancoj?

— Ek! Ni iru!

Pasis nur minutoj, kaj la judaj kaj filiŝtaj batalantoj formis unuecan taĉmenton, meze kun kelkaj judaj pastroj kaj filiŝtaj princoj.

— La taĉmento estas batalpreta! Ek! Antaŭen!

La sunradioj orumis niajn paperkaskojn, lignoŝildojn. Niaj jupoj flagris kiel sangaj standardoj. Sub niaj lignoplandumaj sandaloj rulbruegis la tero.

— Ek! Ek! Ek!

La hokokrucanoj ne sciis, kiam neatendite ni aperis antaŭ ili, ĉu ili freneziĝis, aŭ frenezulejo atakis ilin?

Post unu minuto ni estis la venkintoj sur la kampo.

La hokokrucanoj forkuris, lasante ĉion tie.

— Ni venkis! — hurlis filiŝto.

— La diablo prenu ĉi tiun stultan vivon! — blasfemis la juda ĉefpastro. — Trans la muro niaj kamaradoj perlaboras trimil kronojn, ĉar ili militludas. Ĉi tie ni reale militas — senpage.

Tradukis: *d-ro István Nagy*

Endre Tóth:

VIKTORO DELMAR

Mi siestis sur la sablo, sub la suno, kaj ŝtele observadis Viktoron Delmar, la mirindan heroon, la multfojan vivsavanton. Ankaŭ li portis unu nuran bankalsonon, same, kiel ni ceteraj sur la strando; sed kia staturo, kia muskolaro! Li rigardis la malproksimon per kvieta, tamen aŭdaca mieno. Li estas la korpiĝinta forto kaj kuraĝo! La statuo de forto kaj kuraĝo!

La apatian someran zumadon de la feriejo subite disŝiris helpkrioj.

— Julĉjo! Venu rapide! Iu estas droniĝonta!

— Iu stultulo denove naĝis al la malpermesita zono ...

— Helpon! Rapide, homoj! Kuraciston!

Tiaspecaj krioj aŭdiĝis cirkaŭ ni, kaj ĉiu kuregis al la lago.

Mortdanĝero! Ĉiu devas helpi! Ankaŭ mi devas helpi! — fulmis la penso en mian cerbon, sed retenis min la fakto, ke mi scias naĝi nur iomete, malbone, kaj en la lastaj tempoj ankaŭ mia koro kvazaŭ ... kaj retenis min eĉ la apatia rigardo, per kiu Viktoro Delmar kontemplis la incidenton.

Mi stariĝis sur benkon, por ke mi pli bone vidu, kio okazas. Ĉiu tumultis, ĉiu vadis al la sama direkto, kie iu luktas kun la ondoj por la vivo.

Ankaŭ mi devus helpi! — mi pensis denove, sed jen! La bruo kvazaŭ mildiĝus iom, kaj jes, oni jam kondukas la savitan viktimon, tra la malprofunda akvo, tuj ili alvenos ĉi tien, la feliĉa malfeliĉulo grakadas, tusadas ankoraŭ, sed jam cirkaŭas lin gajeco kaj rido, la danĝero forpasis.

Mi rigardis denove al Viktoro Delmar. Ni ambaŭ, li kaj mi, pravis. Kial mi estus devinta freneze kuri kun la ceteraj? Inter tiom da homoj ĉio solviĝas per si mem. Kial superflue miksiĝi inter la tumulto! Tion diris al mi la rigardo de Viktoro Delmar, la rigardo de la heroa vivsavanto, kiu estas la korpiĝinta forto kaj kuraĝo, la *statuo* de forto kaj kuraĝo, — starigita de la strand-direkcio en la jaro mil-naŭcent-tridek-sep.

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

240 lit. ***
ultrafridujo 20-litra, -18 C°

Fridiga nutraĵkamero de la familio

Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR. Jászberény

Poemoj de László Gál

László Gál (nask. en 1902) eldonis sian unuan poemlibron en Budapeŝto, kiel dudek jara junulo. Poste li transloĝiĝis al Jugoslavio, sed daŭre li verkis en la hungara lingvo. Ni esperas, ke lia originaltona, kelkloke freŝe impertinenta poezio trovos plaĉon ankaŭ ĉe la internacia legantaro. Li mortis en la jaro 1975.

POETO

Volis bruligi la mondon
foje unu poeto,
prenis li plumon kaj blankan paperon,
faladis la krudaj brulemaj vortoj,
flagrantaj ruĝaj krudaj vortoj sur la blankan paperon,
varmegaj vortoj,
per alumeto pli eblus.

MALJUNECO

Hieraŭ al mi gustaĉis cigaredo
hieraŭ mi devis atendi aŭtobuson
hieraŭ gazetoj svarmis je novaĵaĉoj
hieraŭ mi perdis la ŝakopartion
hieraŭ kafo al mi amaris
hieraŭ mi ne trafis la nomon de mia unua amo
hieraŭ mi maljuniĝis.

ENVIO

Mi envias junajn
ili amos, brulos kaj forbrulos
kaj ili envios junajn.

KANTO PRI REVOLUCIO

Revolucio
kanto, kiu plue kantiĝas
son', kiu neniam mallaŭtas
paŝo post kiu sekve ekpaŝi necesas
cel', kiu eskapas kaj ree

revolucio
fajro, kies ardo flamas
vundo, kiu sanigita sangadas
aŭtun', post kiu printempo alvenas
vintro, post kiu printempo alvenas
somer' post kiu printempo alvenas
kaj printempo, kiu havas siajn printempojn
revolucio tute ne haltadas

revolucio
ŝtupetaro, kiu ĉielemas
kaj post la ĉielon al sepa ĉielo
ĝis la venko, ĝis malvenko,
kontraŭ la nano, kontraŭ koloso
kontraŭ revolucio

revolucio estas revolucio.

Esperantigis
Boriša *Miličević*

Memormoneroj de MIKLÓS BORSOS

KURACPLANT-EKSTRAKTOJ

La evoluo de medikament-kemio produktas kemiaĵojn novajn, pli fortefikajn por servi la kuracadon. Tamen por kuracado de iom ĝenaj, aŭ anticipado de ripetiĝantaj haŭtmalagrablaĵoj, plendoj, sufiĉas apliki moderefikajn, ne danĝerajn medicinaĵojn.



Laŭ mult-jarcentaj spertoj por supraj celoj altgrade taŭgas

EKSTRAKTOJ el kuracplantoj

Fabrikas kaj letere sendas senpagan konsilon:

Szilasmenti Tsz gyógynövény-üzeme és laboratóriuma

(fabriko kaj lobaratorio de kuracplantoj)

H—2144 Kerepes

KURACPLANT-EKSTRAKTOJ

KAMOMILGUTO

malgrandigas, mildigas inflamon, efikas trankvilige, desinfekte

PAPRIK-ALKOHOLAĴO

diluita, ŝmirfrotite vigligas la sangocirkuladon kaj sangoprovizadon, fortigas la muskolaron

TIMIANGUTO

medikamento kontraŭ tusado kaj raŭkeco

MENTOGUTO

uzata kiel teo reguligas la funkciadon de stomako kaj intestoj

HISOP-ALKOHOLAĴO por piedo

unika medikamento kontraŭ mikozo, ŝvitado

PLANTA HARALKOHOLAĴO

grasaj kaj sekaj hargutoj, purigas la kaphaŭton, malpliigas kaphaŭterojn kaj jukon

NI REKOMENDAS ANKAŬ AL VI!

Eksportas:

CHEMOLIMPEX Külkereskedelmi Vállalat

H—1145 Budapest, Thököly út 105.

LA UTILIGO DE DANUBO

D-ro Ferenc László

Danubo estas la plej internacia rivero de la mondo. Ĝi estis ĉiam grava faktoro de la ekonomia-socia evoluo de la popoloj vivantaj apud ĝi. Ne troviĝas eĉ unu rivero sur la terglobo, kies akvolekta teritorio apartenus al ok diversaj landoj, apud kies bordo vivus 8 popoloj.

Pli ol du milionojn da jaroj ondadas Danubo en la olda Eŭropo en longeco de 2860 kilometroj, de praaj tempoj natura kunliga vojo inter la Nigra-Maro kaj Okcident Eŭropo. Tiu rivero, nutranta vivon, riĉa en naturaj trezoroj havis ĉiam grandan rolon en la ekonomiaj kaj kulturaj kontaktiĝoj inter popoloj, kiuj vivas sur ĝiaj bordoj.

Tiu preskaŭ tri mil kilometrojn longa akvovojo estis kaj estas unu el la ĉefaj itineroj de la pratempa kaj de nuntempa komercado. Praaj nomoj greke, latine: *Istros, Ister, Danubius;* Dio Danubius gardis „limes", la limojn de Romia Imperio.

La romianoj havis signifan floton sur Danubo, tiu floto defendis ilian viglan komercan navigacion. Imperiestroj Tiberio (42 a. K. — 37 p. K.) kaj Trajano (52—117 p. K.) konstruigis vojon apud la kaskada, rifplena etapo de malsupra Danubo (hungare *Vaskapu* (Ferpordo), turke *Demirkapu,* rumane *Clisura,* serbe *Prigrada.* Tie nur inter 1890—1898 konstruigis la hungara ŝtato 80 metrojn larĝan navigeblan kanalon meze de la ŝtona riverfluejo). Por faciligi la transpason super la Danubo la romianoj konstruis flos-, ligno-, kaj ŝtonarkaj-pontojn. En la XIX-a jarcento staris ankoraŭ la Romia ŝtona volbaja ponto ĉe *Mehadia* (Rumanio).

Ankaŭ Karlo la Granda havis grandan militfloton sur Danubo kaj estis vigla ankaŭ la komerca navigado. Li pensis la unuan fojon pri la kunligo de Danubo kaj Rejno. La kanalon, *„Flossa Carolina"*, — kies kelkaj negrandaj restajoj eĉ hodiaŭ estas troveblaj — oni komencis konstrui en 793.

En la IX-a jarcento Danubo iĝis la vojo kondukanta al oriento. Kompreneble en tiu tempo la ŝipistoj devis lukti kun multaj danĝeroj — ne menciante la malsanojn kaj epidemiojn — ĝis kiam ili atingis siajn malproksimajn celojn. Malgraŭ ĉi tiuj la trafiko kontinue kreskis. Ĉirkaŭ 1350 la ŝiphaŭladon per homoj transprenis haŭlado per ĉevaloj, kaj tiu navigadmaniero restis uzata ĝis apero de la vaporŝipo.

Dum la turka regado la trafiko regresis sur la malsupra etapo de Danubo, sed sur la supra etapo ĝi plu prosperis. En la jarcentoj XVII. kaj XVIII. estis tre vigla la komerca navigado sur la 800 km-a etapo inter *Ulm* kaj Hungario. La transportitaj varoj estis salo, greno, vino kaj ligno. Konekse kun la Supra-Danuba trafikokreskado en la unua duono de la XIX-a jarcento denove aperis la penso kunligi Danubon kun la rivero Majno kaj tra ĝi kun Rejno. Inter 1836 kaj 1846 estis konstruita la kanalo Ludoviko *(Ludwigs-Kanal)* inter *Kehlheim* kaj *Bamberg.* Sur tiu kanalo oni ŝipiradis ĝis j. 1943 per trenitaj barĝoj kun maksimuma kargo de 100 tunoj.

Fine de XVIII-a jc. estis tre vigla la ŝiptrafikado ankaŭ sur Mez-Danubo. La hungaraj fratoj *Kiss* (Kiš) proponis en 1791 — argumentante per ekonomiaj kalkuloj — al imperiestro Leopoldo la Dua, konstruadon de kanalo inter Danubo kaj Tiso (de *Bezdán* ĝis *Óbecse* — nun en Jugoslavio); tiu Kanalo *Ferenc* (Francisko) estis ekkonstruita en 1792, do 44 jarojn pli frue, ol la ekkonstruado de la kanalo Ludoviko. Al Kanalo Ferenc poste estis alkonstruita nutra kanalo ĉe *Baja* kaj brankanalo al la apuddanuba urbo *Újvidék (Novi Sad,* en Jugoslavio).

La unuan vaporŝipon *„Carolina"* sur la Danubo ekfunkciigis en 1818 nia landano Antonio *Bernhardt,* deveninta el *Pécs.* Post pli ol dek jaroj, en 1829 fondiĝis *Első Szabadalmazott Duna-Gőzhajózási Társaság* (Unua Danuba Patentita Vaporŝip-Asocio), kiu ekirigis la regulan vaporŝip-trafikadon inter Budapeŝto kaj Vieno printempe de 1831. La unua Danuba ŝipfabriko estis tiu en Óbuda (nun tria distrikto de Budapeŝto).

La vaporŝipo iom post iom superfluigis la haŭladon per ĉevaloj. La kapacito de vartransportaj trenbarĝoj kreskis de 300—400 tunoj al 1000—1200 t ĝis la komenco de la dua mondmilito, sed trafikis sur Danubo, precipe sur la delto-regiona etapo ankaŭ la tn. grekaj trenbarĝoj de ŝarĝkapaĉito 3000—3500 tunoj. En periodo antaŭ la dua mondmilito flagoj de multaj Eŭropaj landoj ornamis la Danuban bildon.

En la unuaj jaroj post la dua mondmilito preskaŭ tute paŭzis la trafiko. Parte ja ankaŭ la ŝipveturado ne estis sekura pro la multaj minoj, ŝip- kaj pontruinoj en la fluejo sed ankaŭ la ekonomiaj kaj aliaj kondiĉoj de la vartrafiko nur malrapide formiĝis. Regule evoluanta navigado estas menciebla nur depost 1950.

Multflanka utiligo de Danubo

Kune kun la evoluo de la ekonomia vivo la rolo de la akvo iom post iom metiĝis frontloken en ĉiu lando de la tero. Tio estas la klarigo de tio, ke tutmonde oni dediĉas ĉiam pli grandan zorgon al la sistema utiligo de la riveroj, lagoj, profundaj akvoj. Grandan respondecon havas la apuddanubaj popoloj sur tereno de la racia utiligo de la riveraj valoroj. Tiujn taskojn oni povas solvi sole per la harmoniigita aktivado kaj komuna fortostreĉo de la interesitaj landoj. Ni povas firme aserti, ke la naturdonitaj cirkonstancoj de Danubo servas universalajn interesojn, ekonomian prosperon ne sole de la rekte tuŝitaj regionoj, sed de ĉiuj popoloj en Eŭropo.

La multflanka kompleksa utiligo de Danubo estas tiel grandsignifa — por pluraj jardekoj etendiĝanta —

Elevatoro por ellevo de gruzo,
— laborprodukto 400 m³/horo





Danubo ĉe Budapeŝto

tasko, kies solvo kunportas ekonomi-geografian ŝanĝon en granda parto de nia kontinento. La kompleksa utiligo postulas granddistancan antaŭvidon de ĉiuj koncernaj landoj. Sur akvokolektejo de Danubo vivas nuntempe 76 milionoj da loĝantoj. Post la konstruado de la kunligaj kanaloj — kune kun la grandiĝo de la interesitaj teritorioj — la loĝantaro estos 240—250 miliona.

Ekzamenante la Danub-valon estas konstateble, ke ĝi ampleksas tian ekonomian teritorion, sur kiu estas produktataj ĉiujare po pli ol 250 miliardoj da naciaj enspezoj. Kvankam oni ne havas precizajn indikojn pri tio, tamen oni povas probabligi kun certeco, ke inter ĉiuj riveroj de la Tero, Danubo staras sur la unua loko rilate la grandecon de la naciaj enspezoj produktitaj sur la akvokolekta teritorio. Supozante, ke la produktita nacia enspezo kreskas jare per 3—5 %-ĝis j. 2000 ĝi atingos 800 miliardojn da dolaroj. Ankaŭ tio montras la signifon de kompleksa utiligo de Danubo.

La konstruado de akvonodoj (akvoŝtupoj) en la Danubo, servas samtempe plurajn celojn, tio estas grava tasko ne sole por iuj landoj, sed por la tuto de la akvokolektejo. Ankaŭ la industri-politiko de la futuro postulas antaŭenpaŝon en la utiligo. La kreskanta akvo-bezono, akvopurigo por la industrio ĉiam pli kaj pli postulas kompleksajn solvojn, internacian kunlaboron. Laŭ vidpunkto de la industriizado jam hodiaŭ, — sed en la estonteco eĉ pli —, konkurkapablaj estos nur tiuj terenoj, kiuj unuparte posedas akvon en sufiĉa kvanto, aliparte per surakva frajtado povas akiri la amasvarojn necesajn por la produktado. Per elkonstruado de la Kanalo Danubo—Majno—Rejno la industrie evoluantaj landoj apud la meza kaj malsupra etapoj de Danubo povos per malkara intern-akvovojo alligiĝi al preskaŭ tuta Eŭropo.

Evoluigo de akvovojo

Danubo estas navigebla de *Ulm* ĝis la Nigra-Mara enfluejo sur longo 2586 km. La etapo inter *Ulm-Kelheim* nuntempe estas konforma por trafikado sole per ŝipoj kun malprofunda mergiĝo pro la malfavoraj vadej-cirkonstancoj. De Kehlheim ĝis Vieno dum kelkaj jaroj formiĝos plenkonforma akvovojo. Sur la malsupra etapo la ekfunkciigo de la akvonodo *Vaskapu* (Ferpordego) ĉesigis la navigadajn malhelpojn. Pluan evoluon de ŝiptrafiko obstaklas la vadejoj inter *Pozsony* (Bratislava) kaj *Gönyü*.

Unu el la plej grandsignifaj problemoj de la kompleksa utiligo de Danubo estas elkonstruado de la moderna akvovoja reto. En la trafik-organizajoj de la landoj kun evoluinta ekonomio, en la lastaj jardekoj kreskis la signifo de surakva frajtado, — precipe rilate la transportadon de amasproduktaĵoj. La kompleksa utiligo de Danubo iĝis tasko interesanta preskaŭ tutan Eŭropon, speciale se ni konsideras la Danubo—Majno—Rejno—Kanalon, pretiĝontan en la jaroj post 1980, — kaj la 13 landojn, situantajn, en ĝia interesosfero.

Per konstruado de tiu Kanalo realiĝas la pr. 3500 km-ojn longa Eŭropa transkontinenta akvoitinero kondukanta de *Sulina* (Danub-delto) ĝis Roterdamo, kunliganta Nigran Maron kun Norda Maro... La kanaligado* de Majno finiĝis en 1971 per konstruado de 35 akvonodoj. Estas pretiĝinta la etapo da la kunliga kanalo: *Kanalo Eŭropa*, inter *Bamberg-Nurenbergo* kaj tiel de 1972 Nurenbergo estas havenurbo, havanta rektan konekson kun Atlantiko. Laŭ la planoj je 1982 estos pretigita la etapo inter Nurenbergo—Kehlheim, poste en 1989 estos preta ankaŭ la kanaligo de la etapo de Danubo inter *Kehlheim—Passau*.

La Aŭstria Danub-etapo estas rondcifere 300 km-jn longa. El la ĉi tien planitaj 12 akvonodoj jam konstruiĝis 6. Oni jam komencis la konstruadon de la akvonodo en la tereno de Abwinder en 1976. Ĉiun trian jaron per la transdono po unu akvonodo la kanaligo de la tuta Aŭstria etapo estos preta ĝis 1994.

Per realigo de la Kanalo Danubo-Majno-Rejno, per la kanaligo de la tuta Danubo ekestos tia transkontinenta akvo-itinero, kiu donos eblecon por grandamasa kaj malkara vartransporto, akcelos favoran ŝanĝon en la produkta organizo de la koncernaj landoj kaj per tio ankaŭ la ekonomian prosperon.

La evoluigo de la Danuba akvovojo favore influas la pli bonan eluzon de la havenoj, helpos la senŝarĝiĝon de aliaj trafikaj brancoj, kaj per tio samtempe kreas eblecon por elkonstrui novajn naciajn kaj internaciajn akvovojojn.

Energioproduktado

La rapidtakta evoluo de industrio kaj agrokulturo de la landoj apud Danubo rezultas kreskon de la energi-bezonoj. La limigita kvanto de la tradiciaj mineralaj hejtmaterialoj, la menciita kresko de energi-pretendo, krome la kompleksa utiligo de Danubo malfermis novajn eblecojn kaj donis elanon al ekonomia produktado de elektra energio per la akvoenergio-cent-

**kanaligi: „transformi riveron en kanalon" — farante ĝin navigebla, digante la bordojn, rektigante la fluon" („PIV"), per dragado, forigo de rifoj, ktp.*

kanalizi: „provizi per kanaloj regionon, landon" („PIV" por irigacio, — por kunligi riverojn, lagojn; — urbon kanalizi: per kloako — kanaloj.

Taluskonstruado per terajmaŝinoj

raloj. Samokaze troviĝas favoraj eblecoj en la Apuddanubaj montet kaj montregionoj por energiorezervado per pumpiloj, por produkti elektran energio-maksimumon.

La niveldiferenco inter la Danubfonto kaj la mara enfluejo estas 678 m, el tiu la planitaj 27 kaj la jam konstruitaj 20 akvoenergio-centraloj utiligis 350 m-ojn por akvofaligo. Tiu proporcio estas taksebla tre favora, konsiderante la tipon de rivero akompanata per digoj, kaj la surbordan densecon de de loĝlokoj. Ĝis jarfino 1976 estis konstruita el la ekonomie utiligebla suma povo de 8000 MW de la Danubaj energicentraloj entute 3600 megavattoj. Efektive en 1976 la jam elkonstruitaj energicentraloj produktis 19,4 miliardojn kWh el la ekonomie produkteblaj teoriaj 44 miliardoj kWh (44 %).

La energetika utiligo de Danubo en la lastaj jaroj akceliĝis. En la supra etapo kontinue antaŭeniĝas la elkonstruado, en la malsupra etapo estas preparataj pluraj akvonodoj — laŭ interregistara konsento.

Ŝirmado kontraŭ inundoj, riverregulado

Karakterizaĵo de Danuba akvokvanto-ŝanĝiĝo estas, ke inundoj povas okazi en ĉiu sezono. Inundoj kaŭzitaj de pluvoj okazas vintrofine, printempe. Inund-akvorezervujoj de grande kapacito en la Danubvalo ne estas konstrueblaj pro geografiaj naturdonitaj cirkonstancoj. Tiaĵ oni povas pliigi la sekurecon de la apudriveraj regionoj per reguligo de la inunda fluejo, per kontraŭinundaj digoj.

Danubo estas ĝis la Viena Baseno per altaĵoj akompanita. De la dumila km malsupren irante ĝian fluon akompanas digoj, escepte kelkajn mallongajn etapojn. La Danubaj kontraŭinundaj digoj konstruiĝis sur aluviaj sedimentoj. La baza tavolo en la supra etapo konsistas el krudaj ŝtonetoj, kiu laŭ la riverlongo irante malsupren iĝas pli kaj pli subtila. En la malsupra etapo — malsupren de vilaĝo *Dunaföldvár* jam konsistas el sablo kruda, aŭ kelkloke subtila.

La dikeco de la baza tavolo tralasanta akvon estas tre varia. En *Szigetköz* (52 km-ojn longa, 8—10 km-ojn larĝa insulo ĉe urbo *Győr)* tiu trasorbiĝa tavolo dikas kelkcent metrojn, dum en la malsupra etapo troviĝas partoj, kie en profundo de 10—15 m jam oni trovas akvoizolan tavolon. La akvo-tralasan tavolon kovras ĝenerale 0,5—6 m dika, pli-malpli akvoizola tegajo. La digoj pretiĝis grandparte el tiu tertavolo.

La dimensioj de la talusoj ne estas unuecaj, — ilia kvalito, kompakteco ĝenerale ne estas kontentiga, ofte sur pluraj longaj etapoj estas necesa la plifortigo kaj alteca, kaj laŭsekca. En 1954 pro la dipromiĝo ĉe *Ásványráró* preskaŭ la tuta insulo *Szigetköz* estis kovrita per akvo, kaj en 1965 pro la talusdisiĝo sur la maldekstra bordo, en la Ĉeĥoslovakia flanko, sur *Alsó-Csallóköz* kaj en tereno de *Komárom* (nun *Komarno)* rondcifere 500 km^2 estis sub akvo.

Sur la Danubetapo post *Nagymaros* (do ĉe la Danubangulo norde de Budapeŝto) gis la suda landimo estas necesa la evoluigo de kontraŭinundaj konstruaĵoj krom la fluej-reguligaj laboroj. Inter tiuj estas plej grave pretigi la ŝirmkonstruaĵojn kontraŭ inundoj pro glacitumultiĝoj kaj plenumi la riverreguligajn laborojn.

Kontraŭ inundoj kaj por flosigo de glacioj estas farataj sistemaj dragadoj ankaŭ sur etapoj en Jugoslavio kaj Rumanio.

Mastrumado de akvoprovizo

Sekve da la kreskanta industriizado, urbanizado kaj evoluo de agrokulturo intenzive kreskas la uzado de akvo. Kontentigo de la akvopretendoj estas certigebla nur per sistema rezervigo, respektive per la akvonivel-reguliga kapablo de la akvonodoj estiĝantaj konekse al la riverkanaligo.

Pro la industria kaj koloniada altiro de Danubo, la rapida kresko de la akvobezonoj konstante leviĝas an kaŭ problemoj por bonigi la akvokvaliton kaj por la internacia divido de akvoprovizoj.

Infrastrukturo

La kompleksa utiligo de Danubo meritas apartan atenton en rilato kun la urbegoj kaj ĉefurboj. Ekzemple Budapeŝto kaj ĝia altira regiono estas unu el la plej grandaj popolumadaj, industriaj kaj kulturaj centroj de Mez-Eŭropo. En amasvar-trafiko de tia „aglomeraĵo" estas bone utiligebla la akva fraitado. Ĉar la internlandaj akvoj prezentas tre favorajn kondiĉojn por transportado. Per la kompleksa utiligo de Danubo eĉ pli bone reliefiĝas la favora ekonomi-geografia situo de Budapeŝto, kaj tio estas rilate la pluan evoluon rezulto efikanta je granda perspektivo.

La urbegoj situantaj apud Danubo, inter ili unuavice Vieno, *Pozsony (Bratislava)* kaj *Belgrado (Beograd)*, kiel Danubaj ĉefurboj evoluas funkcie de utiligo de Danubo.

La nuna du-miliona etato de Budapeŝto kaj la plua kvincent mila etato de ĝia aglomeraĵo reprezentas kvaronon de la loĝantaro de Hungario, — sed la ĉefurbo kaj la aglomera zono havas eĉ pli grandan parton en la tuta nacia enspezo. La akvomastrumadaj interesoj de tiu regiono koneksaj kun Danubo okupas gravan rolon en la akvomastrumado de la lando, kaj la pretendoj de la ĉefurbo havas karakteron pezocentran.

Je la efiko de la akvonodoj formiĝas rezervujoj, kiuj favore influas ankaŭ la akvoprodukton de la putoj servantaj akvoprovizon de loĝantaro kaj de industrio.

La surbordaj urboj kaj vilaĝoj per siaj loĝighistoriaj kaj artmonumentaj valoroj, krome la favora boniĝo de la kondiĉoj de surakva trafikado multe aldonas al la fremdultrafika rolo de la rivero. Oni devas kalkuli je formiĝo de novaj riverbordaj refreŝigejoj, je kresko de nombro de vizitantoj sur la jam ekzistantaj fremdultrafikaj lokoj.

Ĉefaj konstruadoj de plurcela utiligo

La moderna utiligo de Danubo komenciĝis en la 1920-aj jaroj per la akvonondo ĉe *Kachlet* (apud Passau). Tiu konstruaĵo servas unuvice utiligon de akvoenergio, — por plibonigo de navigado ĝia efiko montriĝis nur sur mallonga etapo.

Pluan evoluon helpis la Rejno-Majno-Danubo Akcia Societo, fondita por utiligo de Majno kaj la bavara Danub-etapo, — krome la Aŭstra Danuba Energicentralo.

La unua kompleksa projekto pri la Danub-etapo post *Dévény* (ĉe la iama limo de Hungario, nun la Ĉeĥslovakia *Devin)* pretiĝis inter 1956—60, kiel rezulto

de la komuna laboro de Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo.

Komence de la 1960-aj jaroj akceliĝis la konstruado de akvonodoj. Ankaŭ en la supra etapo oni direktis pli grandan atenton al la plurcela utiligo. Pretiĝis la akvonodoj ĉe *Aschach, Wallsee, Ottensheim* (Aŭstrio). En la malsupra Danub-etapo en 1972 estis ekfunkciigita la Akvonodo *Vaskapu* (Ferpordo).

En la etapo super Budapeŝto plej grandsignifa estas inter la planitaj konstruadoj la akvonod-sistemo *Gabcikovó-Nagymaros*, planita en komuna ĉeĥoslovakahungara investado, kiu bazos la pluan ĝeneralan ekonomian evoluon de norda regiono Transdanubio. La baldaŭa utiligo de la energio produktata per la akvoenergio-centraloj, la kresko de la kontraŭ-inunda sekureco proporcia al la ŝirmitaj valorajoj, la akvoprovizaj kaj irigaciaj avantaĝoj, krome la internacia akvovojo kaj la ebleco konekŝigi al ĝi efike helpas la industrian akcelon, refreŝigan kaj fremdultrafikan ekprosperon de ĉi tiu regiono. La akvonodaro adaptiĝante al kompleksa utiligo de Danubo konformas al signifaj internaciaj interesoj. Foriĝas la obstakloj antaŭ la kresko de internacia akva trafikado kaj per la utiligo de la areoj apud la reguligitaj novaj akvosurfacoj (rezervujoj, forlasitaj Danubfluejoj) elformiĝas nova fremdultrafika alloga pejzaĝo.

220 km-a estas la reguligata Danubetapo inter Pozsony — Budapeŝto, kreskas la valoro de la areoj apudaj, kiuj iĝas konformaj por semajnfina ripozado. La investado realigas orient-okcidentdirektan enlandan, kaj samtempe internacian akvovojon, kiu kompletiĝos per la kanaligo de rivero Tiso kaj per konstruado de la nova Danub-Tiso-Kanalo.

La sekvaj ĉefaj rezultoj de la supre skizitaj laboroj doniĝas por la Apud-Danubaj landoj:

La utiligota natura akvoenergio inter Pozsony (Bratislava) kaj Budapeŝto rezultos, ke la averaĝa energioproduktado de la energiocentraloj estos jare po 3,6 miliardoj KWh, kies 40% estas la tage po kvinhora maksimum-energio. El tiu suma energio Hungrio ricevas 50%-ojn, t. e. 430 MWh* povon, resp. 1,8 miliardojn KWh da energio. La ĉi tie produktita elektra energio superfluigas por Hungario importi jare po 650—700 mil tunojn da ŝtonoleo.

La fortigitaj kontraŭ-inundaj digoj de Akvonodaro. la akvoj alportitaj per inundo kaj disdonitaj per funkciakvaj kanaloj, la dragado planita ĉe la akvoenergiocentraloj por ricevi pli grandan altecon de akvofalo kreas tiel grandan sekurecon kontraŭ inundoj, kiu ne estas atingebla per aliaj rimedoj. Tio estas precipe grava sur la profunde situantaj terenoj danĝerigitaj per inundoj — sur la etapo inter *Pozsony* kaj *Nagymaros*.

Per realigo de la Akvonodaro estas efektivigeblaj navigaciaj cirkonstancoj kontentigantaj eĉ perspektivajn postulaĵojn, konformajn al rekomendoj de la Danubkomisiono, sur tiu Danubetapo, kie pro la amasa sedimentiĝo nuntempe la plej malgranda estas la navigacia tralaseblo. Per la aliĝo al la Kanalo Danubo-Majno-Rejno, elkonstruota ĝis 1982, ebliĝas la akva frajtado por la Danubregionaj landoj — al la Atlantiko.

Enflueja konstruaĵo de Ŝio ekfunkciigita en 1975





Modeleksperimento de la malnova Danubo kaj de la Riverbaraĵo ĉe Dunakiliti (VITUKI, Budapeŝto)

Per la kompleksa investado, favoraj cel-spezoj estiĝos do moderna *hejmalanda* kaj *internacie signifa* akvovojo 230 km-a, konforma por grandaj ŝipoj.

La evoluigo de Danubo, kiel akvovojo sinkrone bazas la ampleksigan eblecon de la kontaktaj riveroj kaj kanaloj, la pliboniĝon de funkciaj kaj trafikaj kondiĉoj de la landinterna navigado.

Sur la Budapeŝta etapo de l'Danubo estas disponita konforma larĝa kaj profunda navigvojo, nek tie, nek sur la ĉirkaŭa tereno necesas iom gravaj riverreguligoj. Por intereso de la vartrafikado la perspektivaj projektoj enhavas la ampleksigon de la haveno de *Csepel* (Ĉepel) kaj ĝian modernigon. Tiuj planoj efektiviĝos kune kun la plivastiĝo de la rolo de Danubo, kiel akvoitinero.

Sur la Danub-etapo post Budapeŝto la navigaciaj cirkonstancoj estas pli favoraj, ol sur la supra etapo. Ĝis la jarcentfino oni ne devas kalkuli pri konsiderindaj navigaciaj obstakloj, ĉar la bezonata akvoprofundeco estas atingebla per la planataj — kaj pro la inundoj necesaj — river-reguligaj laboroj. Por definitiva elkonstruado de tiu etapo la perspektivaj projektoj antaŭvidas konstruon de Akvonodoj de *Adony kaj Fajsz*.

La Akvonodo Adony havos post la plenkonstruado povon de 150 MW, kiŭ produktos energion de 775 milionoj da KWh, — tiu de Fajsz kun la atendata povo de 100 MW-oj donos energion de 650 milionoj da KWh. Krom la energetikaj kaj navigaciaj avantaĝoj la Akvonodo Adony efikos favore la akvoprovizon de la ĉefurbo.

Por plibonigi la navigadajn cirkonstancojn de la Jugoslavia etapo jam estas ekzamenataj la eblecoj por konstruado de akvonodo apud *Ujvidék (Novi Sad)*.

En 1976 realiĝis nova interŝtata konvencio konstrui novan jugoslav-rumanan akvonodon komunan: *Vaskapu* (Ferpordo) II. — Ankaŭ sur la etapo ruman-bulgara okazas jam preparoj por komuna akvonodo.

Ĝis la dumila jaro konstruiĝos ĉiuj projektitaj Danubaj akvonodoj ...

Tr.: A. Pechan

Glaci-rompado sur Danubo (inter Mohács kaj Fajsz)

RECENZOJ

Personajo

Giorgio Silfer: De tempo al tempo *Originalaj poemoj. Eld.: Librofako de Literatura Foiro, Kuopio-Milano, 1977. 87. p., 24 cm. Prezo: 10,— ned. gld.*

La aŭtoro estas konata redaktoro de la revuo *Literatura Foiro.* Ĝis nun li aperigis du libroformajn verkojn: kolekton de noveletoj sub titolo *Drole kaj petole* (1972), kiuj ne elvokis fortan reeĥon, kaj la dramon *Doktoro Rosales* (1973), kiu havis pli bonan sorton: ĝi eĉ atingis surscenigon antaŭ internacia publiko.

Mi timas, ke tiu ĉi poemaro ne multe emocios poeziamantojn. Supozelbe Silfer mem havas tiajn konjektojn, kiam li komentas siajn poemojn per la jena konstato: „... se oni naskiĝis kaj vivis en norditala grandurbo post la dua mondmilito — kaj estas esperantisto — oni komprenos plurajn aferojn". Certe malmultaj kontestos, ke nur tre eta parto de la esperantista legantaro povos kontentigi tiujn kondiĉojn.

Jes ja, la tuto aperas plie kiel lirika taglibro de inteligenta juna homo, ol kohera poemaro. Tiun ĉi karakteron ŝajnas konfirmi ankaŭ la komentoj de la poeto, kiel ekzemple: »En aŭtuno mi revenis al Milano. Al la rutino." Estis verŝajne malagrable. Sed kial mi bezonas scii tion?

Ĝenas la koherecon ankaŭ la fakto, ke ne ĉiuj poemoj estas verkitaj en Esperanto: aperas versaĵoj en la angla, itala, kaj eĉ en la venecia dialekto. Mi timas, ke mi ne estas la sola, kiu ne povas sekvi Silfer sur tiu poliglota aventurvojo...

Kompreneble, troviĝas multaj poemoj, kiuj estas senripraĉaj kaj verkitaj kun inteligenteco kaj metiscio — fakte la plimulto apartenas al tiu kategorio. Sed, bedaŭrinde, neniu el ili vere forte kaptas la atenton, neniu el ili vekas verajn emociojn. Silfer priverkis siajn travivaĵojn, pensojn kaj sentojn, sed ne kapablis levi tiun priverkaĵon al valideco de komuna intereso. Supozeble tiuj poemoj malgraŭ la publikigo, restos personaĵoj de la aŭtoro.

Slovaka antologieto

Kanto super lulilo. Ok slovakaj aŭtoroj. Red.: O. Knichal. Eld.: Čeha Sekcio de MEM, Prago, 1976. 32 p., 20 cm.

Tiu ĉi malgranda — sed plačaspekta — antologio enhavas ses poemojn kaj tri prozaĵojn inter la ĉi lastaj ŭnu novelon kaj du romanfragmentojn. Ĝi alportas specimenojn el la moderna slovaka literaturo, kiu cetere estas unu el la plej malmulte konataj Eŭropaj literaturoj. Ĉi tie Esperanto vere peras al ni verkojn nekonatajn.

Ni rigardu unue la poemojn. L'udmila *Podjavorinská* estas la sola aŭtoro, kiu rolas kun du verkoj en la antologieto. Sincere, mi ne scias, kial? Legante ŝiajn poemojn, mi cerbumis nur pri unu afero: ĉu eble ili havas iun specialan ĉarmon, atmosferon en la originalo, kiun la tradukino ne sukcesis kapti, aŭ ili sonas same tede en la slovaka, kiel en Esperanto?

La knabino de la preseja maŝino de Ján *Smerk* same ne multe impresis min, kaj tiom pli mi bedaŭris, ke la pli impeta *Servistino* de Laco *Novomeský* pro mallertaĵo de la enpaĝigisto restis nefinita... En la poemo *Vizite post longaj jaroj* de Ján *Kostra* alternas bonaj versoj kun malpli sukcesaj, kaj ofte ĝenas la tordita vortordo de la esperanta teksto. Sendube la plej emocia peco de la poezia parto estas la titoldona poemo de Vojtech *Mihalik:* ĝia tono elvokas memoron pri la *Siberia lulkanto* de *Baghy,* sed la temo estas multe pli vaste konceptita, ol ĉe la hungara poeto. Estas bedaŭrinde nur, ke la konstruo de la poemo estas iom malfiksa, kaj krome malpliigis ĝian efikecon ĉe la fino klišaj kaj didaktikaj partoj. Ĉiukaze la tradukinto, Jiři Kořinek, faris sian eblon.

La romanfragmentoj estas tre mallongaj, por povi prijuĝi ilin; la novelo *Por aĉeti panon* de Gregor Tajovsky, verkita en la jaro 1909, estas agrabla legaĵo.

Elstara poeziaĵo

James Thomson: La urbo de terura nokto. Poemo. Trad.: William Auld. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, Abyhoj, 1977. 48., 20 cm. Prezo: 4,50 ned. gld.

Jen nomo de poeto, pri kiu scias nur eble malvasta rondo de specialistoj de la angla literaturo. Oni enmanigas la libron nur iom hezite, kaj evidentiĝas, ke Esperanto povas peri al ni nekonatajn trezorojn eĉ el la t. n. „grandaj" literaturoj.

La urbo de terura nokto estas filozofia poemo, iom nervoze, tamen ekonomie spicita per romantikaj motivoj. La tuto de la poemo estas senfina inundo de pesimismo. Ĝi aperas senmanke, perfekte jam en la du komencaj versoj: *„Jen mi sternite, sur la polvo strekas/ Pri kor' marasma, larmoj senesperaj".* Kaj fakte tio daŭras same, en mil variaĵoj samdiraj. Tamen, oni ne timu monotonecon. *Thomas* scias ĉiam nove kaj nove vesti sian direndon, foje li nuancigas ĝin, foje aliras ĝin el aspekto tute malkutima kaj surpriza. Tiel al tuta verko fariĝas maltrankvila, nervoza pulsado, iaspeca baraktado por spiro.

La poezia lingvaĵo estas tre densa, intensa: tiu ĉi poemo ne verkiĝis (pli precize: tradukiĝis) por la bezono de progresaj kursoj. Eĉ sperta poeziamanto devas lukti persiste, se li volas konkeri por si tiujn versojn. Tradukante ĝin *Auld* ne havis facilan taskon: ne mirinde, ke li laboris super tiu traduko dum deksep jaroj. Sed la rezulto estas impona: li regalas nin per eminenta esperanta poezia teksto.

RECENZOJ

Traduka ĉefverko

Robert Burns: Kantoj poemoj kaj satiroj. Trad.: W. Auld kaj R. Rossetti. Eld.: Esperantaj Kajeroj, Manĉestro, 1977. 77 p. 21 ms.

La nomo de Robert *Burns* estas konata verŝajne al ĉiuj legantoj de nia revuo: depost la jaro 1786, kiam aperis lia *Poemoj ĉefe en la skota* dialekto, liaj verkoj apartenas senĉesinterrompe al la komuna kulturtrezoro de la monda literaturo. Kaj li havas bonŝancon, pri kiu povas fieri nur malmultaj poetoj: liaj poemoj estas ne nur laŭdataj, sed ankaŭ legataj.

Do, tiu ĉi kolekto por la plimulto de la legantoj alportas ne surprizoĝojon, sed la ĝuon legi verkojn jam konatajn kaj ŝatatajn en alia vesto. Kelkiuj opinias, ke tradukado de poemo estas ĝia interpretado, ne nur lingve, sed ankaŭ sence. Tiamaniere, legante poemon jam konatan en alia lingvo, oni havas la eblon trovi en ĝi latentojn ĝis tiam ne perceptitajn, oni povas intimiĝi pli proksime kun la koncerna poemo.

Estas kaŭzo por aparta ĝojo, se oni retrovas ŝatatajn verkojn en tiel luksaj sed harmoniaj vestoj, per kiaj garnis tiujn ĉi faciltonajn sed fakte rafinitajn poemojn *Auld* kaj *Rossetti*. Estas aparte laŭdinda la traduko de la *Kantoj*, kie ili ambaŭ kontraŭstaris la tenton produkti tro facilfluajn, kaj pro tio simpligitajn, banalajn versojn, sed samtempe la kantebleco tamen ne estis foroferita.

Mi povus senfine denombri poemojn, kiuj faris al mi tre agrablan impreson: mi menciu el tiuj la petolajn *Fenestre kiu frapas, he?* kaj *Tro junas mi por nupti, ho.* Sed meritas mencion ankaŭ tiaj perloj, kiel *La preĝo de pia Vilĉjo, Diablo kaj doganisto* aŭ la du versioj de *Jon Anderson*. Estas konate, ke Burns ne postlasis tre multajn poemojn, tamen, *Aŭld* kaj *Rossetti* meritas laŭdon ankaŭ kiel redaktoroj: sur nuraj sepdek paĝoj ili kapablis doni senmankan kaj eĉ nuancitan bildon pri la poezio de la skota bardo. Modela estas ankaŭ la konciza, sed informplena antaŭparolo.

Resume: tiu ĉi rava — kaj ankaŭ teknike plaĉa — volumeto estas eble la plej grava kaj komuninteresa kontribuaĵo al nia traduka literaturo dum la pasintaj jaroj, kaj la legantoj certe ankaŭ sen mia rekomendo inde akceptos ĝin.

Misvojo

Johan Hammond Rosbach: Fianĉo de l' sorto. Originala romano. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, Abyhoj, 1977. 193 p., 20 cm. Prezo: 45 danaj kronoj.

Apero de nova originala romano ĉiam estas atentinda evento, tiom pli, se ĝi venas el la plumo de J. H. *Rosbach*, kiu estas eble la plej regule verkanta prozisto de nia literaturo dum la lastaj jardekoj: *Fianĉo de l' sorto* estas lia sesa libro kaj laŭ *Auld* en la antaŭparolo, lia unua *romano.*

Ĉi tie mi ne volas kontesti tiun opinion — kvankam mi ne plene estas konvinkita, ke *Fianĉo de l' sorto* estas *vera* romano — ĉar prezentiĝas problemoj pli gravaj. Por prilumi tiun, necesas tuŝi iomete la karakteron de la pli fruaj verkoj de la norvega prozisto.

Rosbach atingis prestiĝon kaj famon kiel meditema kronikanto kaj priverkanto de la „bagatelaro" de la vivo, t. e. li priskribis inventeme originale ĉiutagajn okazaĵojn, ĉiam kapablante montri novajn, surprizajn aspektojn de ŝajne grizaj fenomenoj. Pro tio liaj verkoj je supraja lego ŝajnis monotonaj, neinteresaj, sed por inteligenta leganto, sukcesanta kapti la „ondolongon" en kiu „elsendis" la aŭtoro tiuj verkoj havis specialan aromon. La senpasie koncentitaj, senorname sed nuancite formitaj, agrable ruliĝantaj frazoj rakontis pri mirakloj de ĉiutagaĵoj, latentaj tragedioj de ŝajne seneventaj vivoj. Spicis tiun verkaĵon nur kelkaj noveloj kun pintigita drama konflikto.

La verda robo (1974) distingiĝis per sia okulfrapa malsameco direle la pli fruaj verkoj de Rosbach. Ĝi estis efektive malsukcesa detektivromano, avare spicita per Rosbachaĵoj. Tamen, ŝatantoj de lia prozo povis konsideri ĝin simpla ekskurso al nova kampo, kiel foje-foje ankaŭ operkantisto, eble trinkinte iom tro, zumkantas stultan kanzonon. Ĝi ne signifis danĝeron por la estonta vojo de Rosbach, ĉar oni emis supozi, ke ankaŭ li mem konsideras ĝin nura ekskurso.

Sed *Fianĉo de l' sorto* montras, ke li envias la furoran sukceson de la lastatempa ondo de poramuzaj prozaĵoj, kaj entreprenis danĝeran eksperimenton, kiu povas nur malsukcesi: li volas ĝemeligi, kunagordi sian profundpenetran verkistan vidmanieron kun la suprajaj rekvizitoj de la poramuzaj legaĵoj.

En *Fianĉo de l' sorto li* provas teksi historion originalan kaj eksciten. Li utiligas la intensan publikan interesiĝon pri la seksa sociologio kaj psikologio, kreante strangan „kvaropon" — nu, konsistantan ne el poetoj sed el belaspekta junulo kaj tri ekstravagancaj knabinoj, kiuj pro diversaj kialoj ŝatas esti haremvirinoj. Sed krom la vivo de la supra stranga kompanio oni povas abunde legi pli pluraj similaj delikataĵoj: amorado en rivero (aprezinda lertaĵo, ja laŭ miaj geografiaj konoj riveroj en Norvegujo eĉ dum somero devas esti malvarmaj), ombro-striptizo en soleca domo, ktp. Oni ne miskomprenu min, mi ne kontraŭas erotikon en literaturo, eĉ ne la rekte erotikan literaturon. Sed mi ne ŝatas, ke oni alfliku kiĉe banalan erotikon al temo serioza, kun kiu ĝi havas neniun organikan rilaton. *Rosbach* volis prezenti per tiu ĉi libro la vivon de norvegaj infanoj kaj gejunuloj antaŭ kaj dum la dua mondmilito. Kaj tiu prezento havas bonajn kaj belajn paĝojn, ekz. la ĉapitron „Teatro". En tiuj partoj ankaŭ la stilo estas inda al Rosbach, malsame al la postaj partoj, en kiuj la aŭtoro vagas tra kampoj esence malintimaj por li: ĉi tie la stilo fariĝas supraja, kruda, malsupera ne nur al la propre Rosbacha stilo, sed ankaŭ al la eleganta lingvaĵo de la „caroj" de poramuzaj verkoj, kiel *Beaucaire, Lorjak aŭ Valano.*

Fianĉo de l' sorto estas hibrida verko kaj pro tio malsukcesa. Jes ja, hundo gardanta du pordojn restos malsata. Estus bedaŭrinde, se Rosbach ne revenus al sia pordo.

(Kiĉa: filistre sengusta.)

V. Benczik

Pri la komenco de la okcidenta muzikkulturo

Se oni aŭdas kanton de hungaraj kamparanoj, oni povas konstati, ke ili kantas *unisone* t. e. en oktavoj. Ne nur la urbanoj, sed eĉ la kamparanoj mem sentas en ĉi tiu okazo, ke ili kantas ĉiuj la saman melodion.

La plejmulto de la muzikantoj kaj muzikaŭskultantoj pensas, ke la oktavo, kiel preskaŭ identa tono ekestis en la pratempoj, kiam oni ne scipovis eĉ legi kaj skribi. Sed ĉi tiu opinio estas erara.

La unua ŝtupo de la „Eŭropa" kaj „okcidenta" muzikpercepto aperis en formo de muzikaj kutimoj en Antiohio — ĉefurbo de la antikva Sirio — kiu jam ekde multe da tempo estis vigla haveno kaj unu el la centroj de la mondmerkato. Ne mirinde do, ke multaj opinioj, multaj perceptoj kaj religioj renkontiĝis ĉi tie. Ankaŭ la lulilo de la kristanismo troviĝas en tiu regiono.

Sed ankaŭ aliaj orientaj lokoj rolis kiel bazoj de la nova religio kaj novaj ideoj — de la kristanismo. Interese estas, kiel priskribis la juda filozofo kaj teozefo *Filon* de Aleksandrio la diservon de la antikvaj kristanoj dum la komenco de la dua jarcento p. K. Post la prediko daŭris la diservo tiamaniere, ke unu el la adeptoj kantis melodion laŭ sia propra invento (li do improvizis), aŭ himnon de la poetoj de l'antaŭaj tempoj. La kredantoj — viroj kaj virinoj aparte — grupiĝis kaj kantis kantojn, unu grupo post la alia; ĉiu grupo havis sian antaŭkantanton (aŭ kantantinon). Post tio la du ĥoroj — grupoj — unuiĝis je komuna kanto. Ĉi tiu komuna kanto estis ne nur por la partoprenantoj, sed ankaŭ por la aŭskultanto profunda travivaĵo.

Povas esti, ke en la granda amaso de la tiama *popolo* — do en la rondoj de la sklavoj kaj kamparanoj — ĉi tiu maniero de kantado jam estis konata. Sed la fakto, ke la aŭskultanta filozofo trovis ĝin eksterordinara travivaĵo, montras ke la izoliteco de la „popola" muziko de l'supraj klasoj malhelpis la enkondukon de kelkaj muzikaj esprimiloj — eble jam atingitaj per la evoluo de la kulturo en la la muzikkulturon de la regantaj pli altaj klasoj social — en klasojn de la sklavposedantoj.

Tre interese estas, ke en la verkoj de la antikvaj grekaj dramoverkistoj ni ankoraŭ ne rekontiĝas kun la samtempa kantado de altaj kaj malaltaj voĉoj. En la dramoj de Aiŝhilo, Eŭripido kaj Sofoklo viroj kaj virinoj neniam kantas samtempe. El tio ni prave povas konjekti, ke en la 4—5-a jarcento a. K. eĉ la tiamaj grekoj — kiuj jam atingis altan gradon de la kulturo — ne alvenis al la kunkantado de viroj kaj virinoj. Estas same interese, ke en la dramoj de Eŭripido la virinaj ĥoro-grupoj eksonas plej ofte: el la 16 dramoj de li nur 6 enhavas viran ĥoron (se ni konjektas, ke en la dramo „Ion" la horoj estas virinaj — eĉ nur 5). En la dramo de Eŭripido *Alkesto* eksonas ĥoro de maljunuloj, en *Heraklo* „ĥoro de nobelaj maljunuloj de *Tebo*". En ĉi tiuj okazoj ni staras antaŭ du ekzemploj de malaltaj voĉoj.

La eksterordinara travivaĵo de *Filon* de Aleksandrio montras. ke kvazaŭ antaŭ li ekestis io tute nova, ĝis tiam en la alta muzikkulturo ne ekzistanta arta esprimilo en la kantado de la fruaj kristanoj: la kunkantado de viroj kaj virinoj.

La kutimojn de la pratempoj bone montras frazo el la Nova Testamento. En la I. epistolo de Paŭlo al la Korintanoj ni trovas la sekvan ordonon: „La virinoj silentadu en la eklezioj; ĉar ne estas permesite al ili paroli, sed ili submetiĝu, kiel ankaŭ diras la leĝo." (Ĉapitro 14, verso 34.) Ĉi tiu ordono baziĝas laŭ la ĝis nun diritaj, ne nur sur sociaj cirkonstancoj (sur la regulo, ke la viro ludu la rolon de mastro kaj ordonanto), sed estas evidente, ke la muzika percepto en la tempo de la koncepto de la epistolo, la muzika sento ankoraŭ ne evoluis tamaniere, kiel laŭ priskribo de *Filon* ekaperas ne multe da tempo poste.

La priskribo de *Filon* pruvas ankaŭ, ke la radikoj de la Eŭropa kaj okcidenta muzikkulturo, la sortformiga muzikkultura evento, per kiu komenĉigas nia hodiaŭa muziko — etendiĝas trans la limojn de Eŭropo.

Lajos Lesznai

D-RO LAJOS LESZNAI 1904—1977

Dum nia lasta redakcia kunsido li ankoraŭ vigle diskutis kaj kiel kutime, ĵetis ideojn kaj opiniojn en la priparolon, demandis kaj konsilis prudente, — same junece, kiel ekde la fondiĝo de Hungara Vivo li kunagis en la redaktaj laboroj. Kiel partopreninto jam ĉe Literatura Mondo, Lajos Lesznai utiligis sian erudicion, profundan lingvan scion por gardi kaj progresigi la nivelon de nia revuo: la ioma sukceso ĉi rilate, iĝi inda posteulo de la glora L. M., apartenas ankaŭ al liaj kontribuoj. Tre ofte finis niajn disputojn lia engaĝita argumentado, bazita sur fideleco al la ideoj: socialismo kaj Esperanto.

Sekvante same fidele sian amatan majstron, Béla Bartók, kiu konduk̂is nian neforgeseblan amikon al altaj sferoj de la muzikestetiko — kies altajn, kandidato — kaj doktoro — gradojn li atingis meritplene —, li senlace kaj pasie disvastigis konojn pri la muziko, aparte pri tiu de Bartók, kaj pri la kantoj de la hungara popolo; lia lasta studo tiuteme aperis en Scienca Revuo (1976/2—3). Lia monografio — libro pri Béla Bartók, alte taksata de Eŭropaj fakuloj, akiris plurajn eldonojn en Anglio kaj GDR. Simile atingis gravajn sukcesojn lia scienca biografio pri W. A. Mozart; internaciaj muzikisto-societoj invitis lin nove-denove aŭskulti liaj sciencajn prelegojn dum kongresoj, simpozioj; ĉu ni aldonu, komparu al tiaj omagoj, ke li — aktiva membro de la Scienca Rondo de E-Klubo Konkordo en Budapeŝto — volonte paŝis antaŭ publikon dum niaj kongresoj, ISU, samtiel fervore en etaj E-grupoj!?

Homo fortkaraktera, kia li estis dum ĉia ŝtormo de la historio nuntempa, ekde la junaĝo partoprenis la minaco-plenan vivon de komunista partiano, interne de sindikatoj, de sportisto-rondoj, suferante la policajn persekutojn de la tiama faŝisma reĝimo.

Li amis ĉion, kie manifestiĝas harmonio: apud la muziko kompreneble la naturon, la migradon en la montaroj, supren al la pintoj, vidi la helan horizonton, por kiu li nelacigeble agadis ankaŭ surtere en la socio, kiu distingis lin ofte per honoro. Lia lasta montgrimpado — en oktobro — finiĝis malfeliĉe; kvankam kun kuracebla korpo, en la hospitalo lia fervore pulsanta koro neatendite haltis. Vasta aro de amikoj kaj konatuloj akompanis liajn cindrojn al lasta ripozo fine de novembro.

GARDU LA VIVON!

Ni citas el poemo de Julio *Baghy*, en kiu li protestas kontraŭ la teruraĵoj de milito.

Ensendi sufiĉas nur la kaŝitajn du vicojn ĝis la 1-a de marto 1978. Inter la solvintoj ni lotumos libropremiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. *Unua vico de la citaĵo 13.* Hungara aktorino, ŝi apartenis al teatra ensemblo de Julio Baghy (Irena) dum la 15-a UK. 14. Persona pronomo 15. Sankta libro de mahometanoj (R) 16. Urbo en Nederlando ĉe limo de FRG 17. Dancvespero 19. Katolika preĝejo (R) 20. Kvar sesonoj da poento (!) 21. Kiu ne.., tiu ne gajnas. 23. Posedа pronomo 24. Luksemburga, Tajlanda kaj Svedia aŭtoj. 25. Litervicon sekvi (R) 26. „Superoksigeno" (R) 27. Membro (R) 28. Uranio kaj oksigeno 29. Amaso da pomo (R) 31. Agrablaĵo de floro (R) 32. Inklinas al iu ago pro ofta ripetado 34. Preskaŭ rondforme 36. Posteularo (R) 38. Rilata al iu kordmuzikilo 40. Mahometana pastro (R) 41. Pure, virge... 43. Protesta alvoko (arkaika formo) 45. Sekvanto de ismo 47. Enhavas oleon 48. Interne 49. Titanio 51. La patro de Zamenhof 53. Povanta esti (R) 54. ...Pola Aŭtuno 55. Farita el nobla metalo 57. Fari artefaritan materion 59. Bongustigilo (R) 60. Malkonfesi 62. Plenumo de ies volo 63. Subdivido de genro 64. Romano de Zola 66. Kemia simbolo de americio 67. Ceramika floto (R).

VERTIKALAJ VICOJ: 2. Bone redaktita E-ĵurnalo el Japanio. 3. Sudfrancia urbo (departamento Gard) 4. Sekigi grundon per subteraj tuboj. 5. Sekreciilo de urino (R) 6. UT 7. Inklinas al io. 8. Fadeno far raŭpo 9. Tria potenco de du 10. Farunaĵo dispecigita je malgrandaj partoj (R) 11. Flosi laŭ puŝo de fluo (R) 12. ... Internacia Semajno=VIS *13. La dua vico de citaĵo* 17. Havanta samtempe du edzinojn 18. Verda insulo en dezerto 21. Grava ilo en boato (R) 22. NaOH 25. Pola aertrafika firmo — kie estas oficiala lingvo ankaŭ E. 26/a Provtempon pasiganta monaĥo 29. Sindeteno de fremdvortoj (R) 30. Larvo de papilioj 31/a. Virnomo araba — reen 32. Kemia elemento (R) 33. Trovebla ankaŭ en Esperanto-insignoj 35. Artikolo difinita 37. Infan'-reen 39. Pruvo de senkulpeco (R) 42. Grado en evoluo (R) 44. AVL 46. Rando de tuko 48. Genro de tagpapilioj (R) 50. Virina nomo 52. Dometaĉo (R) 54. Muzika teatraĵo 56. Kauzi incitan senton ĉe dentoj (R) 58. ...konstante (Zamenhof) 59. Havas tri dimensiojn (R) 61. Femalo 63. La komuna skandi kaj skato 65. Kiel horiz. 27. 67 Sufikso por esprimi kolektivecon.

Imre Szabó



La solvo de nia krucenigmo aperinta en la 4-a numero de Hungara Vivo estas: Novaj poemoj, Sur la ĉaro de Elio, Sango kaj oro. Margita volas vivi.

Libropremion gajnis: Ferenc EGRY (Hungario), Dieter BERNDT (GDR) kaj Wolfgang LOOSE (FRG).



LITERO-STELO

Jen 11 literoj en kvinpinta stelo. Provu konsistigi el ili kiel eble plej multajn *kvinliterajn vortojn!* Vi povas iri nur laŭ la linioj. Saman literon ne uzu dufoje, nur se vi paŝas al la najbara litero kaj poste reen! „Haltante" ne eblas duobligi la literon.

Ĉu vi sukvesis dudek vortojn kunmeti? Se jes, malfaciligu la taskon: serĉu ses-, sep-, okliterajn vortojn! Kiu estas do, la plej longa vorto ellegebla?

Vi povas laŭ nia desegno fari tre utilan, neelĉerpeblan lingvan ludon, se vi kopios ĝin. Tiel vi povas konkursante ludi. Kaj se jam ne taŭgas la literoj, ŝanĝu ilin!

Kiel prononci hungarajn nomojn?

Ne-hungaraj legantoj foje petas konsilon de nia redakcio, kiel estas prononcendaj certaj gravaj hungaraj nomoj: la regnestro *Rákóczi*, la interesa historia figuro *Mihály Károlyi*, kaj aliaj. Jen ni donas mallongan klarigon, resp. konsilon:

Hungara litero	Laŭ Esperanta fonetiko	Ekzemploj
C kiel	c	Laci = (lac')
		palóc (palooc)
CS	ĉ	Kalocsay (kalocai)
CZ (nur en nomoj!)	c	Géza Bárczi (bárci)
G	g	
GY	dj	magyar; Gyula (djula)
H	h	
J	j	
LY	j	Károlyi (károji)
NY	nj	Balkányi (balkánji)
S	ŝ	Pest (peŝt)
SZ (SSZ)	s	Szeged urbo (seged)
		Tisza (tisa)
TY	tj	matyó (matjo)
Z	z	Zolnay (zolnai)
ZS	ĵ	Zsuzsa (ĵuĵa)

Kiem jam videble, Y servas en la supraj kvar duoblaj literoj kiel moliga signo (gy, ly, ny kaj ty), sed en aliaj okazoj,

Y estas simple i, kaj ne „j"! Déry (deri). Tial — kalocai, bagi, zolnai, contvari, deri — sed pro la moliga efekto: kodaj zoltan, karoji mihaj, gergej, tarkonj, lendjel. Espereble, vi kara ne-hungara leganto, ekkonos la tie ci *fonetike* skribitajn nomojn.

Pro malnova kutimo, en kelkaj nomoj troviĝas TH GH duoblaj literoj: oni neglektu tiun H, kiu havas nenian fonetikan rolon. Sekve: Baghy (bagi), Bláthy (bláti).

Ö (Ő) kaj Ü (Ű) estas internacie konataj el diversaj lingvoj (germana, skandinavaj), kvankam ne troviĝas en la E-alfabeto; la *strekoj* (anstataŭ dupunktoj) signas ***plilongan*** prononcadon. Same oni longigu la elparolon de O se Ó, kaj de U se Ú estas skribita. Oni elparolu laŭeble pli base A (bagi), ol Á, kiu sonas *pli akre* ol en KAJ, La, GRANDA k. a. (rákóci). Iom simile diferencas inter si E kaj É; *estas, vere, en, jen, dek* indikas la elparolon proksiman de la hungara E (peŝt, petőfi, ferenc), sed la hungara É troveblas en *Eva, eco, celo* se oni iom pliakrigas tiun sonon.

Oni metu ĉiam fortan akcenton sur la *unuan* silabon, eĉ sur la unuan sonon! Sed se vi ne sukcesos perfekte prononci, post tiu ci mallonga leciono, vi rajtos resti tute trankvila!

E. F.

Fotado de la Suno

La Observatorio en Grenviĉo fotografadis dum cent jaroj la surfacon de la Suno. Ĉi tiun aktivadon ĝi finis en decembro de 1976. La Komisiono n-ro lo (pri sun-aktivecoj) de la Internacia Astronomia Unuiĝo petis la Sunfizikan Observatorion de la Hungara Scienca Akademio daŭrigi ĉi tiun agadon, kaj organizi la internacian kunlaboradon pri ĉi tiu temo.

Surbaze de la decido en la estonteco tiu ĉi Instituto — funkcianta en la urbo Debrecen — certigos la homogenan kontinuecon de la kolektado, prilaborado kaj publikigo de la datumoj, la enarkivigon de la originalaj fotodokumentoj, kiuj kompreneble devos esti alireblaj por sciencoj interesiĝantaj el la tuta mondo.

O. Haszpra

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: *Vilmos Benczik*
Responda redaktoro: *d-ro István Nagy*
Arta redaktoro: *Éva Farkas-Tatár*
Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits
Ĉefkunlaborantoj:
Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony
Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest VII., Rákóczi út 54.
Responda eldonisto: D-ro Péter Suth direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96 162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.
La abono estas por jaro (ses numeroj)
Ft. 48.—, al eksterlando krome
Ft. 9,60 por afranko.
Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7.— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto
77-5858 Somogy m. Nyomda 3350
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

F 330

SALO-DISŜUTILO

Tipoj:

STA/3 HDTL
STA/4 HDTL
STA/5 HDTL

Teknikaj indikoj:

Tipo	Enhavo-kapacito m^3	Neta-pezo kg	Ŝarĝo-kapablo kg	Tuta pezo kg	Kamiontipo rekomendita
STA/3 HDTL	3,4	1030	3600	4630	D—452 ZIL—130 +
STA/4 HDTL	4,0	1050	4800	5850	+ +
STA/5 HDTL	5,0	1080	6000	7080	+ +

— Serie fabrikata (3,4 m^3) tipo.

— Fabrikataj nur laŭ mendo. Tiujn porti estas bezonataj aliaj kamiontipoj kun konvena ŝarĝ-kapablo.

La salo-disŝutilo estas dum kelkaj minutoj metebla (aŭ demetebla) sur platformo de kamiono, pere de teleskopa kvarpiedo. Ties alteco estas regulebla per mana kranko.

Interne de la cisterno helica transportilo kaj deaksa frakasilo diserigas kaj dozadas la salon je grama precizeco. La instalaĵo estas teleregebla el la ŝoforkupeo. La hidraŭlikan mekanismon provizas aparta motoro.

Ŝuto-larĝeco: modulebla je 2, 4, 6 kaj 8 m.

Ŝuto-kvantoj: reguleblaj laŭ gradoj de 10, 20, 30 kaj 40 g/m^2 — helpe de aparta aŭtomatismo — sendepende de la vetur rapideco. Laŭnecese eblas elŝuti eĉ pli grandajn kvantojn.

La disŝutado estas multe variebla, modifante la rotacion krome per aliigo de la eliga tubo. Antaŭ en aŭ dorsen veturante egale eblas disŝuti.

Turnante la ŝut-diskon ĉirkaŭ siaj horizontala kaj vertikala aksoj, eblas disŝuti ekzemple sub sia verturilo aŭ precize alŝuti sur malvasta zono, ekz. sur vojorandon.

TRÖSZT KÖZGÉP

KÖZGÉP

Közúti Gépellátó Vállalat

Entrepreno pri ŝose-konstruaj maŝinoj

H–1734 Budapest, xx., Haraszti út 277.

Tel.: 278-250, Telex; 22-4035

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ĈANGEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért

Konsumturist